IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 55 - trimonata
2025/4

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Ekaterina V. Bebenina
Luiza Carol
Emmanuel Desbrières
Francesco Franceschini
Latifou Gbadamassi
Gong Xiaofeng
Mireille Grosjean
Dennis Keefe
Aranka Laslo
Alessandra Madella
Luigia O. Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek
Ramon Perera I Perera
Roberto Pigro
Renée Triolle
Song Zhenyuan
Josef Vojáček
Wei Yubin
Zhang Yating



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
Ekaterina V. BEBENINA: *Paderborna eksperimento kaj ĝia teorio […]* 4
Francesco FRANCESCHINI, Xiaofeng GONG: *Konversacia Trejnejo* 12
Roberto PIGRO: *Plurlingvismo kaj cifereco […]* 19
Yubin WEI, Yating ZHANG: *Esploro pri Reta Instruado de Esperanto […]* 23
Aranka LASLO: *Inkluzivo en retaj kursoj de Esperanto – spertoj el Serbio* 27
Alessandra MADELLA: *Esperanto en EuroCALL 2025 […]* 30
Ekaterina V. BEBENINA: *Recenzo al la libro de Alessandra Madella* 33
Josef VOJÁČEK: *Modela agado surbaze de la libro de Alessandra Madella* 34
El la landoj kaj sekcioj (BJ, CN, FI, FR, NL, CH) 35
Ŝajnigaj teatrecaj ekzercoj (debato) *[…] (PERERA, GROSJEAN, MAMDUHI, KEEFE)* 42
Luiza CAROL, Mireille GROSJEAN: *Dulingva edukado en infanĝardenoj […]* 47
Zhenyuan SONG: *Vilaĝa laboro* 50
Informoj pri ILEI kaj IPR 53

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio. Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Ul. Bočačka 25, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, R. S. Francisco Xavier, 681, bl E, ap 201, Maracanã - cep: 20550-011, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Estrarano: Aimé-Patrick MANIRAKIZA, Buhomba 7 Nr 39, Maramvya, Bujumbura, Burundo, Tel. +25779813485 (Whatsapp, Telegramo), <*apmanirakiza@gmail.com*>. Agado pri Afriko, observanto ĉe TEJO.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford
***Membroj*:**
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu
Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la eksteraj kovriloj: En oktobro 2025, la Studenta Klubo de Zaozhuang-a Universitato partoprenis en du-taga foiro de studentaj asocioj en la nova kampuso. Multaj studentoj alproksimiĝis por lerni facilajn E-ajn vortojn kaj frazojn, ricevante poŝtkartojn de Esperanto-eventoj kiel premion.

Enkonduko

Karaj legantoj,

Estas ĝojo prezenti en ĉi tiu numero la ĉefartikolon de Ekaterina V. Bebenina pri la *Paderborna eksperimento* — unua parto de planita serio kaj vera trezoro por ĉiuj, kiuj, kiel mi, de jardekoj volas pli koni la pioniran laboron de la karmemora Helmar Frank en Paderborno.

Mi renkontis d-inon Věra Barandovská-Frank, lian edzinon, dum mia virtuala kurso *Enkonduko al Interlingvistiko*, kie ŝi instruis ĉapitron el sia valora verko. Mi petis ŝin prelegi pri la paderborna eksperimento, sed ŝi atentigis, ke dum la 11-jara eksperimento ŝi ankoraŭ ne estis lia edzino. La nunaj artikoloj montras, ke la eksperimento fariĝas eĉ pli aktuala en nia epoko de kreskanta intereso pri teknologioj kaj interfakeco en edukado.

En ĉi tiu numero aperas ankaŭ recenzo de Bebenina pri la libro de Alessandra Madella *Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj* (Edistudio, 2023) kaj raporto de Josef Vojáček *Modela agado surbaze de la libro de Alessandra Madella*. Ambaŭ pledas por la integriĝo de Esperanto en lingvolernadon kaj edukadon.

Por plifortigi la efikon de tiu verko, ni lanĉis la Telegram-kanalon **ILEI Podkastoj** (https://t.me/ILEI_pokastoj), kun voĉaj kaj videaj podkastoj en 16 lingvoj, ĉiuj kreitaj per AI-ilo NotebookLM. Inter ili troviĝas la unua tia podkasto, kiun mi preparis en la persa lingvo por konvinki la direktorinon de la gimnazio de mia filino – kiel pruvo por la praktika kaj pedagogia valoro de Esperanto en la moderna mondo.

Ahmad Reza MAMDUHI

Paderborna eksperimento kaj ĝia teorio kiel mankanta elemento por didaktiko de informacia epoko

Ekaterina V. BEBENINA

Profesoro de Rusia Akademio pri Edukado, doktoro habilitita pri pedagogiaj sciencoj



Al la Leganto

Tiu ĉi serio omaĝas la memoron de profesoro Helmar Günter Frank, la kreinto de la kibernetika pedagogio kaj iniciatinto de la Paderborna eksperimento.

Li estis samtempe la aŭtoro de la teorio, kiu pravigis la propedeŭtikan efikon de Esperanto al aliaj lingvoj, kaj la iniciatinto de unu el la plej ampleksaj praktikaj pruvoj de tiu efiko.

La celo de la serio, kiun malfermas ĉi tiu artikolo, estas sufiĉe klara: montri la unikan propedeŭtikan efikon de Esperanto - pruvitan, prognozeblan, mezureblan kaj teorie klarigeblan - sur la lernadon de aliaj fakoj.

Same gravas prezenti specialajn trajtojn de sistemo, kiu kapabligas tiun efikon por krei modelon de studobjekto, kiu ebligas optimumigi lernadon ankaŭ en aliaj sciencaj kampoj.

Unu artikolo tamen ne sufiĉas por tia ambicia celo. Tial la tuta verko estis dividita en tri komplementajn partojn, el kiuj ĉiu povas esti legata aparte, sed kiuj kune formas unu tutecan esploron.

En la unua artikolo, tute teoria, troveblas:

- mallonga priskribo de la Paderborna eksperimento kaj de aliaj similaj iniciatoj;
- enkonduko en la bazon de kibernetika pedagogio, inkluzive de ĝiaj informteoriaj fundamentoj kaj aktuala signifo por nuntempa edukado;
- klarigo de la diferencoj inter la “meta-” kaj “inter-” niveloj de efiko, laŭ la ekzemplo de Esperanto.

En la dua artikolo aperos:

- aplikado de la ideoj de kibernetika pedagogio por analizi la lernadon kiel modelon;
- praktika modelado de la procezo kaj prezentado de la rezultoj;
- respondo al la demando, kia nivelo de mezurado estas taŭga por ĉiu faktoro de la lernoprocezo.

La tria artikolo estos dediĉita al:

- prezento de la teorio de transfero;
- analizo de ĝiaj efikoj kaj priskribo de la ecoj de studobjekto, kiuj kapablas provizi tiun efikon;
- klarigo de tio, kiel la propedeŭtika efiko de Esperanto povas esti utiligita en diversaj edukaj sistemoj.

Metodologiaj fundamentoj de modelado de lernoprocezoj en la informa epoko

Preskaŭ ekde la kreo de Esperanto, dum pli ol cent jaroj (la unuaj vaste konataj rezultoj devenas el la jaroj 1918–1924), okazis multaj eksperimentoj en lernejoj de diversaj landoj. La unuaj el ili havis ĉefe konstatajn rezultojn, dum la pli postaj jam estis pli bone planitaj kaj celitaj esploroj.

Inter ili estis sufiĉe grandaj, kun subteno de ŝtato aŭ universitato, kiel **la Paderborna eksperimento**, **la Egerton Park-lerneja ekzperimento** kaj la moderna **Springboard to Languages**. Entute oni povas paroli pri vico de bone esploritaj eksperimentoj, kiuj entute engaĝis centojn ĝis milojn da lernantoj el pluraj landoj.

Ili ĉiuj havis iom diversajn kondiĉojn, celojn kaj daŭron. La plejmulto tamen analizis, kiom influas lernado de Esperanto al posta lernado de aliaj fremdaj kaj de gepatraj lingvoj. Kompreneble, neniam okazis iu tutmonda, statistike absolute ĝusta eksperimento kun kontrola kaj cela grupoj. Infanoj povas partopreni nur laŭ kondiĉoj de edukleĝoj, volo de ministerioj, lernejoj, gepatroj. Tiuj kondiĉoj, kiujn havas fiziko, medicino aŭ biologio por nomi eksperimenton ĝusta, oni neniam povas atendi en pedagogio. Tamen ĝuste tiuj ne perfektaj kondiĉoj, tiuj iom diversaj celoj kaj gepatraj lingvoj, kiuj montris la saman rezulton, estas, miaopinie, la plej bona pruvo, ke

sendepende de planado kaj hipotezo ĝuste lernado de Esperanto mem certe helpas al lernado de fremdaj lingvoj, plifaciligas komprenon de la logiko de la gepatra lingvo kaj havas kromefikojn al lernado de aliaj studobjektoj, same kiel al la ĝenerala motivigo al lernado.

Unu el la plej famaj estas **la Paderborna projekto** (1970-aj jaroj, Federacia Respubliko Germanio). Sub gvido de profesoro Helmar Günter Frank unu grupo lernis la anglan dum du jaroj, alia – Esperanton la unuan kaj la anglan la duan jaron. La finaj testoj pri la angla ne montris diferencojn inter la grupoj, kvankam la dua grupo lernis ĝin duoble malpli longe. Tio konfirmas la **propedeŭtikan efikon** de Esperanto - redukton de la lernotempo de la dua lingvo.

Multaj esploroj registris la influon de lernado de Esperanto al la evoluo de metalingvaj kaj ĝenerale kognaj kapabloj, kiuj superas la limojn de pura lingva lernado.

Kadre de Esperanto, multaj esploristoj analizintaj tiun efikon indikis preskaŭ la samon, nome ke Esperanto havas sekvajn trajtojn:

1. **Metalingva konscio.** En projektoj de la fino de la 20-a - komenco de la 21-a jarcentoj (inkluzive de *Springboard to Languages*) estis konstatita statistike signifa pliboniĝo de morfema kaj sintaksa analizo. La efiko estis plej evidenta ĉe pli junaj lernantoj kaj ĉe tiuj kun malforta antaŭa preparo.

2. **Motivado kaj memfido.** En ĉiuj eksperimentaj serioj oni observis kreskon de lernomotivado. Lernantoj pli rapide atingis percepteblan sukceson kaj montris stabilan intereson pri fremdaj lingvoj.

3. **Transfero de analizaj kapabloj.** Raportoj de instruistoj registris pliboniĝon de ortografiaj kaj gramatikaj kapabloj en la gepatra lingvo kaj pli altan sukceson en historio kaj geografio. Tiuj diferencoj estis ne tre grandaj, sed reprodukteblaj.

4. **Lernantoj kun malfacilaĵoj en legado kaj skribado.** En britaj kaj germanaj lernejoj instruistoj notis, ke la regula fonem-grafema sistemo de Esperanto plifaciligas legadon kaj skribadon por lernantoj kun disleksio.

Resumaj recenzoj klasifikas la observitajn rezultojn kiel metafakajn: pliiĝon de metalingva reflektado, evoluon de struktura analiza kapablo kaj kreskon de interna lernomotivo. Tiuj efikoj estas limigitaj laŭ amplekso, sed reprodukteblaj en diversaj specimenoj kaj landoj.

Empiriaj datumoj por la periodo 1918–2011 konfirmas la ekziston de stabila propedeŭtika efiko de Esperanto. Ĝi manifestiĝas per pli rapida formado de gramatikaj konceptoj, pliiĝo de lernomemfido kaj pli granda preteco lerni aliajn lingvojn. Samtempe observeblas metafaka efiko - kresko de konscia struktura analizo kaj motivado, aplikeblaj ankaŭ al aliaj lernaj fakoj.

Kibernetikaj bazoj de kibernetika pedagogio

La lingvo mem ne ŝanĝiĝis en la fundamento, same, malgraŭ multaj streboj de sciencistoj kaj pedagogoj al plimodernigo, pedagogiaj principoj restas la samaj. Tamen la kibernetika pedagogio estas ne nur pedagogio, sed ankaŭ kibernetiko - jam la nomo tion montras. La demando do estas: kiuj estas ĝiaj informaj fundamentoj, kaj kial ĝuste nun gravas ilin trakti?

La esploroj de Claude Shannon en la mezo de la dudeka jarcento fariĝis la fundamento de la informa epoko. Lia artikolo el 1939 metis la principojn de ĉiuj modernaj komputiloj. La teorio de informo, kreita de Shannon, priskribas la ĝeneralajn leĝojn de informado - tiel fundamentajn, kiel la konceptoj de materio kaj energio. Tiuj ideoj fariĝis bazo por la teorioj de ludoj, aŭtomatoj kaj regado, kiuj rilatas ne nur al tekniko, sed ankaŭ al homa agado.

La teorio de informo ankaŭ difinas la bazojn de kibernetika pedagogio, kiu vidas lernadon kiel procezon de redukto de entropio - transiron de necerteco al ordo de scio. La plej malgranda unuo de informo estas bito. Teknike tio estas stato de ŝaltilo: fluo ekzistas aŭ ne ekzistas. Ĉiu mesaĝo povas esti reprezentata per kombinaĵo de tiaj statoj, kiel en la telegrafo aŭ la Morse-kodo. En ĉi tiu logiko la komplekseco de materialo egalas al la nombro da bitoj necesaj por ĝia transdono.

Kompreneble temas ne pri simpla kodado de vortoj: la komplekseco de scio estas inverse proporcia al la probableco. Ju pli evidenta estas la fenomeno, des malpli da informo ĝi enhavas. Glaciigita akvo ĉe negativa temperaturo ne bezonas klarigon; por anglalingvano veno de *u* post *q* estas same antaŭvidebla.

Sekve, lernado estas procezo de ricevo de nova informo. Ju pli granda estas la kvanto kaj komplekseco de la scio, des pli longa lernado estas bezonata.

En kibernetika pedagogio oni uzas science pruvitajn parametrojn de laceco, forgesado, memorado.

La teorio estis kritikata pro mekanistika aspekto kaj nekapablo montri la homan dimension de instruado. Sed kibernetika pedagogio ebligas seneraran, realecan kaj probablan modeladon de la eduka procezo. La probabla modelo (H. G. Frank, F. Cube) baziĝas sur la teorio de aŭtomatoj de Shannon. Ĝi ne priskribas la individuon, sed ebligas antaŭdiri grupajn regulecojn: ju pli granda estas la grupo, des pli preciza estos la prognozo.

Perdo de intereso al kibernetikaj metodoj al lernado okazis de unu fakto - la teorio antaŭiris la praktikon. Komputiloj de la 1970-aj jaroj ne povis prilabori milionojn da faktoj, kaj rimedoj por fiksi datumojn preskaŭ ne ekzistis.

Nun la komputila povo kaj la fontoj de datumoj estas sufiĉaj, sed la problemoj translokiĝis al la hipotezoj: edukaj platformoj ofte suferas pro malĝustaj antaŭsupozoj. En la mondo de grandaj datumoj validas la principo: “rubo enen – rubo el.” Eĉ perfekte funkcianta algoritmo donos eraran rezulton, se la teorio estas malĝusta. Tial ĝusta teoria bazo fariĝis la ĉefa tasko por la kreantoj de edukaj sistemoj.

La potencialo de la nuna etapo kuŝas ĝuste en tio: difini la fundamentojn kaj la staton de aferoj, kaj proponi vektoron kaj bazon de evoluo de didaktiko. Estas klare, ke la klasĉambra sistemo, devenanta de *La Granda Didaktiko* de J. A. Comenius, ne plu aktualas. La socio postulas individuigon de lernvojoj. Komputilo ne devas anstataŭi la instruiston, tio reduktus lernadon al nura informado, sed ĝi povas iĝi potenca ilo por individuigo kaj helpanto de la instruisto. Tiuj ideoj jam ŝajnas memkompreneblaj, sed la sekva paŝo - kunfandi la pedagogiajn metodojn kun komputilaj algoritmoj -, restas unu el la plej neesploritaj direktoj de moderna pedagogio.

En la sekva artikolo estos montritaj kapabloj de tiu modelado por ĉiu lern-procezo kaj la ebloj ĝin optimumigi. En la tria parto ni lasos la limojn de unu fako kaj parolos pri la efiko de unu fako al alia, kiu estas konata kiel propedeŭtika efiko, kaj kiu kompreneble ne limiĝas nur al la efiko de Esperanto. Por tio necesas nun, en ĉi tiu teoria artikolo, tuŝi ankoraŭ unu teorion, kiu estos bezonata por nia celo - montri Esperanton kaj ĝiajn efikojn kiel ekzemplon de mankanta elemento por la didaktiko de la informa epoko.

Metafakeco: administrado de sencoj kaj integrado de scioj

Se la kibernetika pedagogio rigardis lernadon kiel procezon de organizado kaj transformado de informo en scion, la nuntempa etapo de edukada evoluo koncentriĝas je tio, kiel scioj el diversaj kampoj kuniĝas kaj funkcias kune.

La nuna mondo fariĝas pli ŝanĝiĝema kaj neprognozebla. En tiaj kondiĉoj unu el la ĉefaj taskoj de edukado fariĝas ne tiom transdono de scioj, sed evoluigo de la kapablo de homo adaptiĝi al ŝanĝoj, analizi kaj integri grandajn fluojn de informo.

La vojo al superado de la fragmenteco de edukado kuŝas en vastigo de la fakkampo kaj en inkluzivo de *interfakaj* kaj *metafakaj* ligoj. Tio ebligas akordigi la edukadan procezon kun la realaĵoj de la informa epoko kaj prepari fakulojn, kiuj kapablas pensi sisteme kaj operacii ne nur per datumoj, sed ankaŭ per iliaj interrilatoj.

Tiu vojo estas ege fruktodona, kion montras ekzemploj de la STEM-sistemo, projekta lernado kaj multaj aliaj iniciatoj. Sed transformado de faka sistemo estas longa kaj komplika procezo, kiu riskas detrui ne nur malavantaĝojn, sed ankaŭ avantaĝojn, ekzemple multajn didaktikajn trovitaĵojn. Se konsideri, ke vera efiko de edukado aperas tre malfrue, estas tute kompreneble, ke ne ĉiuj landoj pretas al tiaj revolucioj en unu el la plej gravaj kaj konservativaj kampoj. Ĉu ne eblas, konservante la ekzistantan sistemon, tamen, enkorpigi en ĝin novajn elementojn? La tasko ŝajnas esti ekvilibra kaj realisma.

La ideo de *interfakeco* devenas de la verkoj de Comenius, Locke, Rousseau kaj Pestalozzi. En la rusa pedagogia tradicio Uŝinskij vidis *interfakajn* ligojn kiel bazon de sistema scio, kie la “ankroj” estas tempo, loko kaj analogioj.

Interfakeco kunigas fakojn, kreante horizontalajn pontojn inter ili. Metafakeco leviĝas super la fakoj, formante universalajn kognajn kadrojn kaj mekanismojn de sencokreado.

La diferenco inter ili kuŝas ne en la temo, sed en la nivelo de integriĝo:

- *Interfakeco* kunordigas sciojn inter kampoj.
- Metafakeco formas novajn epistemologiajn strukturojn, kiuj kunligas la manierojn de konado mem.

Jean Piaget estis unu el la unuaj, kiuj sistemigis tiujn nivelojn. En sia raporto *L'épistémologie des relations interdisciplinaires* (La epistemologio de interfakaj rilatoj) (OECD, 1972) li distingis kvar gradojn:

- Plurfakeco – simpla kunekzisto de fakoj;
- *interfakeco* – ilia interagado kaj interŝanĝo de metodoj;
- transfakeco kaj metafakeco – niveloj, kie aperas nova unueco de scioj.

„La plurfakeco kaj la interfakeco estas nur etapoj. La transfakeco celas sistemon sen stabilaj limoj inter la fakoj.”– *Jean Piaget, 1972.*

Poste Basarab Nicolescu kaj Jürgen Mittelstraß plue evoluigis tiun aliron. Nicolescu vidis en metafakeco la vojon al „unueco de scio trans la sciencoj”, dum Mittelstraß konsideris ĝin ilo por evoluigi komunajn metodologiajn fundamentojn de scienco kaj edukado.

Tiel metafakeco fariĝas ne nur etapo de integriĝo, sed metanivelo de memreflekto de scienco pri si mem.

Esperanto povas servi kiel ekzemplo de sistemo, kie tiuj niveloj distingeblas tre klare:

Nivelo	Rolo en edukado	Tipaj efikoj
Faka	Studata kiel aparta lingvo.	Regado de gramatiko kaj vortprovizo.
Interfaka	Uzata ĉe la kruciĝo de lingvoj, historio, kulturo kaj informadiko.	Komparo de lingvostrukturoj, kulturoj kaj kuntekstoj.
Metafaka	Fariĝas ilo de kogna reflektado.	Formas sisteman kaj logikan pensadon, faciligas lernadon de aliaj lingvoj.
Transfaka	Eliras ekster edukado, uzata en realaj internaciaj komunikoj.	Evoluigas interkulturan kompetentecon kaj mondskalan pensadon.

Je la interfaka nivelo Esperanto kunligas la fakojn. Je la metafaka nivelo ĝi fariĝas ilo de pensado. Tiel *interfakeco* certigas akordigon de scioj kaj metafakeco provizas ilian sintezon en tuteca sistemo.

La sekva ekzemplo montras, ke la ideo de metafakeco ekzistis longe antaŭ ol oni nomis ĝin tiel. Eĉ antaŭ ol la termino *interfakeco* aperis, ĝian esencon realigis Selma Lagerlöf. Ŝia verko *„La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson kun la sovaĝaj anseroj"* (1907) kunigis geografion, biologion, historion, popolscion kaj literaturon, transformante lernadon en vojaĝon tra sencaj rilatoj. Tuj poste Lagerlöf fariĝis la unua virino premiita per la Nobel-premio pri literaturo (1909). Ĝuste pro ĉi tiu verko, verkita kiel lerniga literaturo por infanoj, en 1914 ŝi estis elektita la unua virina membro de la Sveda Akademio, kio simbolis rekonon de la metafaka graveco de ŝia verko – la unuiĝo de scienco, literaturo kaj pedagogio. Ŝia libro restas unu el la unuaj agnoskitaj ekzemploj de metafaka didaktiko, kie konado de la mondo konstruiĝas kiel tuteca bildo, ne kiel sumo de faktoj.

Intera konkludo

En ĉi tiu artikolo estas demonstrite, ke la Paderborna eksperimento, same kiel multaj similaj esploroj, konvinke pruvis, ke Esperanto havas pozitivan influon kaj sur unuopajn lernfakojn kaj sur la ĝeneralan kvaliton de lernado.

Estas identigitaj la fundamentoj en la kampoj de pedagogio, informa teorio kaj psikologio, sur kiuj en la sekva artikolo estos pritraktataj la propedeŭtika efiko kiel modelebla procezo, kun klare difineblaj mekanismoj de ĝia kontrolo.

Enkonduko en la informteorion malfermas la pordon al la estonteco: ĝuste la specifo de modelado kune kun modernaj kalkulkapabloj ebligas uzi la propedeŭtikan efikon de Esperanto kiel bazan, per praktiko jam de pli ol jarcento konfirmitan teorion por la teknologioj de la informa epoko.

Tiel, estas difinitaj ĉiuj ĉefaj elementoj de la ambicia celo de la serio, kaj la sekva artikolo montros, kiel tiuj teorie bazitaj komponantoj kunmetiĝas en unu tutecan sistemon, en kiu ĉiu elemento servas al la komuna celo - altigi la efikecon kaj la sencoplenecon de lernado.

Referencoj

Frank, H., & Barandovská, V. (1991). Lernplifaciligo pro antaŭmetitaj lingvokursoj. *Internacia Pedagogia Revuo, 4,*11–15. (Represita en *Barandovská, 6,* 1993, pp. 621–625.)

Frank, H., & Formaggio, E. (1992). La profito el propedeŭtika (speciale lingvo-orientiga) instruado depende de la aĝo kaj transfero. *GrKG / Humankybernetik, 33*(4), 164–174. (Represita en *Barandovská, 6,* 1993, pp. 1026–1036.)

Frank, H., & Lobin, G. (1998). *Lingvo-orientiga instruado – Klerigscienca kontribuo al la lingvokibernetiko interlingvistika / Sprachorientierungsunterricht – Ein bildungswissenschaftlicher Beitrag zur interlinguistischen Sprachkybernetik.* München: KoPäd.

Madella, A. (2023). *Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*. Pisa: Edistudio. ISBN 978-88-7036-095-0.

Moiseev, N. N. (1979). *Mathematical problems of system analysis.* Moscow: Nauka. – pp. 45–53.

Nobel Prize Outreach AB. (1909). *The Nobel Prize in Literature 1909 – Selma Lagerlöf: Facts*. Prenita de https://www.nobelprize.org/prizes/literature/1909/lagerlof/facts/

Piaget, J. (1972). *The epistemology of interdisciplinary relationships. Interdisciplinarity: Problems of teaching and research in universities. – pp.* 127-139.

Wiener, N. (1961). *Cybernetics: or Control and communication in the animal and the machine* (2nd ed.). MIT Press. – pp. 24–31.

Konversacia Trejnejo

(Paroligi la senparolajn esperantistojn.)

de Francesco FRANCESCHINI



Kiam kara Arko, en unu el niaj semajnaj video-konversacioj raportis, ke multaj ĉinoj esperantiĝintaj en la okdekaj jaroj tute ne parolas Esperanton, mi ne kapablis tion kredi. En mia cerbo, lingvo estas la voĉo de la homoj, kiuj ĝin parolas. Lingvo mortas kune kun sia lasta parolanto. Eĉ mortinta lingvo tamen postulas la kapablon paroli, ĉar por ĝuste legi en ĝi, necesas

koni ties ritmon kaj sonfluadon. La ideo pri tiuj „senparolaj” kvankam aktivaj esperantistoj pripensigis min kaj instigis min verki paroligan projekton. Riĉigite de la altvalora kontribuaĵo de Arko, naskiĝis „Konversacia Trejnejo”.

La 22-an de oktobro 2024, 34 ĉinaj homoj fizike disigitaj en la vastego de la lando, surekrane aperigis siajn bildetojn gapante antaŭ senakĉenta italo, kiu tro rapide parolis Esperanton el 6 horzonoj okcidente. Krom kelkaj esceptoj, neniu komprenis min. Mi stimulis demandojn, sed neniu kuraĝis. Neniu el tiuj, kiuj tamen kapablas ĉine pridiskuti dum tagoj ian tiklan, sed averaĝe ne tiel gravan gramatikaĵon.



Arko jam informis min, ke ili lernis per nura gramatika studado kaj per pedanta tradukado el kaj al la lingvo denaska. Kaj ke, en la ĉina eduka sistemo, en ĉiu klasĉambro estas 40 studentoj, kiuj ne aŭdacas demandi. Pro tio, du feraj reguloj antaŭkomence estis truditaj: „paroli nur „Esperante” kaj „starigi demandojn”. Por ke la dua sukcesu, kelkaj semajnoj bezonatis.


Ene de la unua monato, la konstato pri du diversnivelaj partoprenantaroj sugestis dividi la grandan klason en du apartajn ĉambrojn kaj la 27-an de novembro komenciĝis merkrede la 2-a – nivela sesio ĝis la 2-a de julio 2025, unu tagon post la fino de la marda sesio.

Esperantistoj, kiuj vizitadas la UK-ojn, konas la malfacilaĵojn, kiujn ĉinoj spertas parolante Esperanton. Malgraŭ la simplaj karakterizaĵoj de la Esperanta fonologio, kelkaj sonoj ne ekzistantaj en la ĉina lingvo postulas fonetikan instruadon, kiu facile sukcesas ĉe la komencaj lecionoj, sed pli kaj pli komplikiĝas kun la tempopaso.

Alia problemo baldaŭ evidentiĝis: severa malfacileco orele kompreni la parolatan lingvon eĉ deklamitan de la plej elstaraj kaj klaraj parolantoj.

Arko kaj mi multe pridiskutis la kialojn de tiuj mankoj. Evidentiĝis, ke maltaŭga metodo kaj mispreparitaj „instruistoj”, mem malkapablaj paroli la lingvon, estas la ĉefaj kaŭzoj.

Lerni Esperanton nur per la okuloj, studante gramatikon kaj legante tekstojn sen interago kun flua lingvoparolanto, nepre kondukas al tio; certe, multe legi Esperante, prefere laŭtvoĉe kaj publike, iom helpas; bedaŭrinde, lege lernitajn sed parole ne uzatajn vortojn oni facile forgesas.




Uzi sensojn, trejni muskolojn, akiri fizikajn, praktikajn rezultojn per imitado estas tio, kion homoj kapablas fari ekde sia naskiĝo: ĉio estas jam profiteble preta en ĉies DNA. Imiti sonojn, rilatigi ilin al konceptoj pri objektoj, estaĵoj, agoj, ecoj kaj sekve paroli estas milionoble pli facile kaj nature ol skribi, legi kaj traduki. Tio devus esti ekde la komenco kaj per tio oni povas draste redukti la lernadtempon kaj multobligi la kontentecon de la lernanto.

Mi ne estas instruisto laŭ la formalaj vojoj. Sed kiel ĵurnalisto, klarigado kaj populariga disvastigado de malfacilaj temoj fariĝis la ĉefa okupiĝo en mia vivo; ĉiam per simpla sed plejeble interesa kaj rigora rakontado kaj debato. El sperto mi scias, ke por kundividi scion kaj kunhavigi ĝin kiel pens-laboratorion, kiel komunan konkeron, la unua paŝo estas malrapidigi, doni al ni tempon kaj paŭzi ĉe la rando de tio, kion ni ne scias. Trovi la plej stimulajn demandojn, la necesajn materialojn kaj krei spacon, kiu permesas al ni esplori novajn padojn.

Por Konversacia Trejnejo, mi bezonis imagi materialojn aŭ ilojn, kiujn ni povas kune konstrui, kune manipuli kaj modifi, kiuj estas samtempe simplaj kaj efikaj, ĉar ni ne povas limigi nin al nura legado de tekstoj.

La celo estas transformi inertan en vivantan scion, eksperimenti per metodo kapabla instigi nin esplori. En tia instruado, la unua bezonata afero estas la tempo: havi sufiĉe da ĝi, ŝteli ĉion, kio necesas.



Manko de tempo estas ĝenerala plendo de multaj instruistoj, sed perspektiva ŝanĝo bezonatas. Ni trovas tempon, se ni proponas malpli da temoj kaj elektas plonĝi pli profunde, imagante instrumetodon, kiu ne estas disŝutita en araneaĵo de multnombraj samplanaj horizontalaj ligoj, sed serĉas vertikalecon, kiu puŝas nin plonĝi profunden kaj ŝvebi supren.


Ĝuste tion mi intencis injekti en „Konversacia Trejnejo”.

Emocio estas la sento, kiun mi lernis fortikigi en la virtualaj klasoj de nuntempaj virtualaj lernejoj; emocio estas la ripeta ĝojo de la defio, de la penado kaj de la konscia respondeco esti referencpunkto, formanta punkto. La celo estas mense kaj kore transdoni kune kun la lingvo ĝian animon, la „internan ideon”.

La „interna ideo”, la pulsanta koro, kiun Zamenhof enblovis en sian lingvon, kiu sola sufiĉas por pravigi la laboron necesan por ĝin konkeri. Tion mi ricevis de mia majstro Renato [Corsetti] kaj de tiuj, kiuj poste daŭrigis lian agadon. Tion mi klopodas restarigi hodiaŭ al miaj lingvaj gefratoj kaj al tiuj, kiuj en la estonteco volos partopreni en tia sperto komuna.

Hodiaŭ pli ol iam ajn necesas komuniki. Tiu ĉi tiom interplektita mondo, eĉ en la merkato de la superkonoj, pli ol iam ajn, hodiaŭ postulas humanismajn kompetentecojn kaj homan komunikadon.

Esperanto estas perfekta ilo por kontraŭbatali kaj kunteni la kaoson, ĉi tiun antropologian kaj kulturan tertremon, kiu trapasas la nunan mondon.



Role de instruisto, mi celas esti honeste malŝatata prefere ol plaĉe kamaradeca aŭ simpatie trompema: alivorte, pli bone malbelaj veroj ol belaj mensogoj aŭ tragikaj preterlasoj. Tio foje postulas tempon por esti komprenata kaj akceptata, sed trans tiu sojlo, estiĝas rilato je tia fido kaj respekto, ke la interkomunikado fariĝas efike facila kaj ĝojiga.


Edukado estas esence rekta rilato: oni ne povas mediacii, oni povas plene repliki ĝin nek per aŭtomataj iloj, nek per artefarita inteligento (AI). Tion, kion instruisto povas iniciati kaj konstrui per rigardo, gesto, persona voĉtembro, samtempa emocia kontakto, silento plenigita per intelekta konekto, neniu maŝino iam ajn povos rekrei.

Maŝinoj certe pli kaj pli kapablos lernigi nociojn kaj informi la homojn, trejni ilin per ripetado ktp., sed instrui, krom la cerbo postulas la koron kaj per ĝi la konektadon de homaj sentoj kaj sensoj, kiun nur interhoma rilato sukcesas starigi.

Sed de la maŝinoj, bona instruisto lernu mezuri kaj taksi la rezultojn kaj uzi tiujn informojn por perfektigi sian agadon. Interalie tio multe helpos malebligi la formadon de „senparolaj” esperantistoj.

Kiam KT-ano reveninte el la UK en Brno, kun briletantaj okuloj, ridetanta mieno kaj entuziasma voĉo diris al mi: „Ĉi-jare, unuafoje mi ĉion komprenis kaj ĉiuj min!”, partoprenante tian ĝojon mi pensis: „Jen la rezultoj, kiujn ni celis!”. La posta penso tuj direktiĝis al novaj kaj malnovaj konversaciemuloj, kiuj jam atendas la malfermon de Konversacia Trejnejo, la dua. Feria tempo finiĝis. Ek!

IPR 2025/4➢16



Aldono de GONG Xiaofeng (Arko)

La virtuala kursaro „Konversacia Trejnejo” estas la unua, ĝis nun unika kursaro gvidita de alilanda esperantisto en la historio de la Ĉina E-instruado. La kursaro daŭris 8 monatojn, 35 semajnojn. Antaŭe mi organizis kaj helpis S-ron Dennis Keefe gvidi vintrajn E-kursojn dummonate en Hainan-insulo kaj en la urbo Guangzhou en la jaroj 2010-2012; mi invitis kelkajn alilandajn E-instruistojn ekz. Peter Weide fizike viziti nian seminarion pri E-instruado en la urbo Taiyuan kaj ili volontule gvidis E-kursaron dumsemajne, tamen virtuale organizi E-kurson por alilanda E-instruisto estas unua fojo dum mia vivo.

Kiel diris Frančesko, ni konatiĝis unu kun la alia ĉe iu reta kurso pri komuna lernado de Paŝoj al Plena Posedo (William Auld). Post babilado venis ideo al ni, ke mi organizu por li retan E-kurson en Ĉinio. Mi admiras lin el mia korprofundo ĉar, por pli faciligi kontakton kun ĉinaj esperantistoj, li lernis manipuli la ĉinajn mesaĝaplikaĵojn „WeChat” kaj kunvenejon „VooV (Tencent)”, ĉar ZOOM ne estas uzebla en Ĉinio.

Mi ne atendis, ke liaj kursoj estos tiel varme deziratajn: kelkdekoj da ĉinaj esperantistoj sekvis lin dum okmonata kursaro. Fakte Frančesko gvidis ne nur tiun ĉi konversacian trejnadon, sed ankaŭ kurson por junaj komencantoj, nomatan „Esperanto-Kurso per Natura Akcelita Metodo”. Partoprenis 11 junuloj malpli-ol-40-jaraj, kun 4 helpinstruistoj. Tiu ĉi baza kurso daŭris 13

semajnojn, ĉiusemajne 2-3 horojn. Malsame ol ĉiuj ĉinaj E-kursoj, Franĉesko ne nur donis al kursanoj hejmtaskojn, sed ankaŭ korektis ilin zorgeme. Ĉiusemajne dufoje minimume unu horon Franĉesko kaj mi diskutis pri la kursoj, la materialoj, la progresoj kaj mankoj de kursanoj ktp. Post ĉiu leciono mi faris statistikojn pri la nombro kaj horoj de la ĉeestantoj, kiuj estas tre elokventaj.

Mi mem estis universitata profesorino kun 30 jaroj da spertoj de instruado. Mi instruis ankaŭ Esperanton en la universitato de 2004-2023 kaj kelkfoje gvidis retajn E-kursojn. Mi havis multe da studentoj bakalaŭraj, magistraj kaj doktoraj, sed dum mia instruado, mi neniam riproĉis ilin, neniam malpacienciĝis kontraŭ ili. Mi pensis, ke mia pacienco jam sufiĉe bonas, tamen ne atendite, Franĉesko havas eĉ pli grandan paciencon ol mi. Liaj ridetoj kaj afablaj mienoj alportis al ĉinaj kursanoj grandegan kuraĝigon. S-ro Nan Youli, pli-ol-80-jaraĝa, honora membro de UEA, ĉeestis ĉiun lecionon de Franĉesko. Li pli ol unu fojon laŭdis antaŭ mi kaj suspiris kun emocio, ke Franĉesko vere estas instruisto malfacile trovebla. Post la fermo de la kurso S-ro Nan sendis al mi siajn vortojn, petante min transsendi al Franĉesko. Mi kopiis ilin jene:

2025/7/2 Nan skribis al Franĉesko:

„Tre estimata,

Mi estas via eksterordinara lernanto Nan Youli.

Kaj vi meritas la nomon de eksterordinare eminenta esperanto-instruisto, kiun mi renkontis en Ĉinio dum kelkdek jaroj!

Ok monatoj pasis. Vi ĉiam restas ridanta, ĉiam montras grandan paciencon, ĉiam tenas grandan toleremon al viaj kursanoj.

Vi kontribuas eksterordinare al ĉina esperantujo!

Via penigo venigas certe progreson por nombro da ĉinaj samideanoj.

Vi laboregas kun nenia profito privata, vi gajnas la koron de ĉinaj esperantistoj! Se iutage vi vizitus Ĉinion, vi trovos fidelajn amikojn ĉie!

Akceptu mian admiron kaj respekton!

amike kaj lernante via Nan”

Mi konfirmas, ke tiuj vortoj estas sentoj esprimitaj ankaŭ de ni ĉiuj kursanoj. Nun en nia babila grupo ĉinaj esperantistoj jam kutimiĝas babili per Esperanto. La 2-a sesio de Konversacia Trejnejo jam komenciĝis, kursanoj partoprenas en ĝi kun plena fervoro en sia laboro. Ankaŭ nova kurso por veraj komencantoj malfermiĝos baldaŭ. Ni laboru!

Plurlingvismo kaj ciferecо transformas nuntempan lingvopedagogion: mediacio, miksita lernado kaj la propedeŭtika valoro de help-lingvoj

Aŭtoro: D-ro Roberto PIGRO (Kipro)

Institucio: MD, MA, PhD Universitato de Udine (Italio). Licea instruisto, iama profesoro de la itala kiel fremda lingvo en Kipra Teknologia Universitato de Limasolo

Resumo:



Ĉi tiu artikolo esploras la lastatempan turniĝon en la instruado de fremdaj lingvoj post la sana krizo de 2020 kaj la publikigo de la Komplementa Volumo de la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj (KERL). Oni analizas la ekaperon de mediacio kiel centra kapablo en komunika edukado, la firmiĝon de miksita lernado kiel norma modelo, kaj la kreskantan atenton al plurlingva edukado de la lernanto. Speciala atento estas donata al la propedeŭtika valoro de lingvoj kun regula strukturo, kiel Esperanto, kiuj montras utilon en komenca trejnado de metalingva konscio, kiam uzataj tra ciferecaj rimedoj. La artikolo proponas kadron por integra, fleksebla kaj inkluziva lingvopedagogio, kiu kunigas ciferecajn agojn, interagan instruadon kaj la aktivigon de la tuta lingva repertuaro de la lernanto.

Ŝlosilvortoj: lingvopedagogio; mediacio; miksita lernado; plurlingvismo; propedeŭtiko; ciferecaj rimedoj; Esperanto

Enkonduko: la post-pandemia ŝanĝiĝo de lingvoinstruaj paradigmoj

La instruado de fremdaj lingvoj dum longa tempo centriĝis ĉirkaŭ la regado de gramatikaj formoj kaj la reproduktado de normaj modeloj. Tamen la lastaj jaroj markis rimarkindan ŝanĝiĝon: la necesa transiro al ret-bazita

instruado dum la kovim-pandemio montris la limojn de ekskluzive fronta pedagogio kaj samtempe rapidigis la ekaperon de modeloj, kiuj kombinas ĉeestajn kaj neĉeestajn fazojn en unu kohera procezo. Paralele al tiu sperta ŝoko, la Komplementa Volumo de KERL (2020) oficiale difinis mediacion kiel fundamentan elementon de komunikado, postulante novan rigardon al la rolo de lernantoj, ne plu kiel pasivaj ricevantoj, sed kiel aktivaj agantoj en interŝanĝaj situacioj.

La du tendencoj, nome ciferecigo kaj teoria renovigo, kondukas pli kaj pli al komprenado de lingvolernado kiel socia kaj kunlabora agado, en kiu plurlingvaj rimedoj estas ne marĝenaj, sed kernaj.

La rolo de mediacio en la nova kadro de lingvokompetenteco

La koncepto de mediacio, laŭ KERL, ampleksas situaciojn, en kiuj la lernanto helpas transdoni mesaĝon, faciligas interagon aŭ interpretas enhavon por alia ricevanto. Temas pri agadoj kiel parafrazo, resumo, komento, klarigo, sed ankaŭ pri interpersona pontado inter interparolantoj kun malsamaj lingvaj konoj.

Tia difino alportas al profunda ŝanĝiĝo en la indikado de la kriterioj de sukceso: anstataŭ nura formala ĝusteco gravas strategia efikeco, kapablo administri signifojn, adapti mesaĝojn, kaj utiligi ĉiujn disponeblajn lingvajn rimedojn, inkluzive de la gepatra lingvo aŭ aliaj jam konataj fremdaj lingvoj.

Mediacio tiamaniere ligiĝas nature al la nocio de plurlingva repertuaro: oni ne plu imagas tiun lastan kiel aron da apartaj „skatoloj”, sed kiel interrilatan sistemon, el kiu oni povas libere ĉerpi dum reala komunikado.

Miksita lernado kiel organiza respondo al novaj postuloj

Post la grandskala uzo de retaj platformoj dum la kovim-pandemio, miksita lernado (kun kombino de aŭtonomaj ciferecaj agadoj kaj ĉeestaj interagoj) jam estas ne escepta opcio, sed stabila normo en multaj edukaj sistemoj.

La divido inter iu fazo de memstara ensorbado de enigaĵo (ekz. per lernoplatformoj, subtekstigitaj filmetoj aŭ interagaj ekzercoj) kaj iu alia fazo de sinteza interago (rol-ludoj, debatoj, problemo-solvado) ebligas plejbonigitan uzadon de tempo kaj rimedoj. La ĉeesta instruado estas

rezervata por agadoj, kiuj bezonas interpersonan interŝanĝon, dum la cifereca parto subtenas ripeton, reflekton kaj celfiksadon laŭ la specifa ritmo de la unuopa lernanto.

Ĉi tiu modelo montriĝas aparte taŭga por integri taskojn pri mediacio, ĉar ĝi ebligas preparajn etapojn en sekura medio, antaŭ ol eniri en kompleksajn interagojn.

Plurlingva aktivigo kaj la okazo de propedeŭtikaj lingvoj

Plurlingvismo en la KERL-kompreno estas ne nur politika slogano, sed didaktika principo: oni kuraĝigas la lernanton utiligi sian tutan lingvan sperton por solvi komunikajn situaciojn. En tiu kunteksto, lingvoj kun regula gramatiko kaj travidebla vortfarado povas ludi gravan rolon kiel komencaj iloj por trejni analizan kapablon pri lingvaj strukturoj.

Eksperimentoj plenumitaj en germanaj kaj polaj lernejoj kadre de la t.n. „Metodo Paderborn" montris, ke mallonga enkonduka kurso en tiel simpla sistemo povas plibonigi konscion pri vortstrukturo kaj funkcioj de finaĵoj, kio poste faciligas la lernadon de nacilingvoj. La efiko estis aparte rimarkebla ĉe lernantoj kun malalta memfido: la rapideco de progreso en regula sistemo kreas senton de kompetento, reduktante la tiel nomatan afekcian filtrilon.

Per nuntempaj ciferecaj rimedoj (interretaj kursoj, aŭtomataj ekzercoj, voĉlegaj iloj) tia propedeŭtika modulo povas esti facile integrita en iun vastan lernoplanon.

Konkludo: ek al orkestra, fleksebla kaj inkluziva modelo de lingvo-instruado

La nuna fazo de lingvopedagogio montras movon for de unudirekta transdono de reguloj al dinamika administrado de signifoj tra diversaj kanaloj, medioj kaj lingvoj. Mediacio, miksita lernado kaj plurlingva strategio estas ne apartaj elementoj, sed partoj kaj eroj de la sama logiko: la lernanto devas ricevi ilaron por agi en kompleksaj komunikaj medioj, kie flekseblo kaj kunlaboremo estas same gravaj kiel gramatika ĝusteco.

Lingvoj kiel Esperanto, se proponataj kiel metalingva trejnilo kaj ne kiel fin-celo, pruvas tion, ke la vojo al multlingva kompetenteco povas esti

planita laŭ ekonomia kaj motiviga maniero. La defio plurfoje por la instruisto konsistas en la kunordigo de tiom da diversaj rimedoj en konsekvenca pedagogia teksaĵo.

La estonta esplorado devus plivastigi empiriajn datumojn pri la efikoj de ciferecaj mediaciaj taskoj kaj pri la longtempa influo de propedeŭtikaj moduloj je plurlingva evoluo. Tamen jam klare videblas, ke rimarkinda transformiĝo nun okazas, kaj ke la plej sukcesaj praktikoj estas tiuj, kiuj akceptas la kompleksecon kaj diversecon de la lingvolernada ago anstataŭ provi redukti ĝin al ununura, unuopa formo.

Bibliografiaj referencoj

Balboni, P. E. (2018). *Le sfide di Babele: Insegnare le lingue nelle società complesse* (Nuova edizione). Torino: UTET Università.

Cognigni, E. (2020). *Il plurilinguismo come risorsa. Prospettive teoriche, politiche, educative e pratiche didattiche*. Pisa: Edizioni ETS.

Consiglio d'Europa / Council of Europe. (2020). *Quadro comune europeo di riferimento per le lingue: Apprendimento insegnamento valutazione – Volume complementare*. Milano: La Nuova Italia.

Ellis, R. (2003). *Task-based Language Learning and Teaching*. Oxford: OUP.

Little, D. (2007). *The Common European Framework of Reference for Languages and the role of learner autonomy*. Brussels: Council of Europe.

Perrone B., & Diadori P. (a cura di). (2023). *Didattica della lingua straniera e nuovi spazi di apprendimento: il Blended Language Learning*. Novara: UTET Università.

Van Lier, L. (2004). *The Ecology and Semiotics of Language Learning*. Boston: Kluwer.

Vezzali, L., & Stocchi, F. (2019). *L'insegnamento delle lingue con le nuove tecnologie: Dalla teoria alla pratica*. Roma: Carocci.

Vygotskij, L. (1978). *Mind in Society: The Development of Higher Psychological Processes*. Cambridge, MA: Harvard University Press.

Frank, H. (1976). *Esperanto und Schule*. München: Reinhardt Verlag.

Esploro pri Reta Instruado de Esperanto Bazita sur „*Paŝoj al Plena Posedo*”

WEI Yubin (Jado), ZHANG Yating (Jatina)

Resumo

Paŝoj al Plena Posedo, verkita de William Auld, estas de mez- al - alt-nivela lernolibro de Esperanto, celanta profundigi komprenon kaj pensadon en la lingvo pere de tekstlega trejnado. La lernolibro emfazas kuntekstan lernadon de novaj vortoj, tiel reduktante la bezonon uzi nacilingvajn klarigojn aŭ vortarojn.

Ekde 2023, ni efektivigas retan instruadon pere de la platformo *Tencent Meeting*, esplorante instruajn modelojn taŭgajn por virtuala medio. La komenca modelo „memlernado-interŝanĝo-ekzerco” montris malaltan efikecon pro malsamaj lernant-niveloj kaj manko de adekvata reago-mekanismo. Sekve, ni optimumigis la modelon al „memlernado-instruado-ekzerco”, en kiu la instruisto rolas kiel gvidanto de klarigoj, uzante heŭristikajn demandojn kaj tavoligitajn ekzercojn. Tiu aliro signife plibonigis la strukturon kaj efikecon de la kurso.

La spertoj de la praktiko montras, ke la nova modelo kongruas kun la pedagogiaj principoj de la lernolibro, kaj povas servi kiel referenco por efektivigo de mez- al - alt-nivela reta Esperanto-instruado.

1. Enkonduko

Esperanto, kiel internacia helpolingvo, celas ne nur lingvokapablojn, sed ankaŭ transkulturan komprenon kaj sendependan lingvan pensadon. *Paŝoj al Plena Posedo* (1967), klasika lernolibro por mez- kaj alt-nivelaj lernantoj, verkita de William Auld, pledas: „Esperanton oni plej bone lernas per studado de bona Esperanto.” Ĝi disvolvas lingvokapablojn per kunteksta legado. La lernolibro inkluzivas vortlistojn en Esperanto, instigante lernantojn diveni vortsignifojn per kunteksto, uzante naciajn vortarojn nur kiam necese, por redukti nacilingvan interferon kaj plifortigi esperantan lingvosenton kaj penssendependecon.

Ekde 2023, ĉi tiu esploro centriĝas pri tiu lernolibro kaj praktikas interretan instruadon per la platformo Tencent Meeting, celante konstrui retan instru-modelon taŭgan por meza kaj supera niveloj de lernantoj. Ĉi tiu artikolo analizas la problemojn kaj optimumigajn vojojn en la instruprocezo,

esploras la instruajn strategiojn kaj efikecon de *Paŝoj al Plena Posedo* en reta medio, kaj proponas reprodukteblan referencan sperton por la interreta edukado pri Esperanto.

2. Karakterizaĵoj de la Lernolibro kaj Dezajno de Instrua Modelo

2.1 Karakterizaĵoj kaj Instruaj Celoj

Paŝoj al Plena Posedo estas fundamenta lernolibro por altnivelaj Esperanto-lernantoj, konsistanta el 30 didaktike strukturitaj unuoj. La enhavo prezentas diversajn tekstĝenrojn:

- Beletristikaj tekstoj (50%)
- Poeziaj verkoj (10%)
- Fakaj artikoloj (10%)
- Aliaj lingvouzoj (30%)

Ĉiuj materialoj prezentas aŭtentikajn komunikajn situaciojn en Esperanto. En la ĉefaj pedagogiaj trajtoj inkluziviĝas:

- Kunteksta lernmetodo: Lernantoj evoluigas la kapablon dedukti vortsignifojn el situacia kunteksto, akirante naturan lingvosenton.
- Senpera lingva aliro: Ĉiuj difinoj kaj klarigoj estas esprimitaj en Esperanto mem, reduktante dependon de la denaska lingvo.
- Gradigita malfacileco: La tekstoj progresas laŭ klare difinita hierarkio de gramatika kaj stila komplekseco.
- Integrita ekzercosistemo: Ĉiu unuo proponas balancitan kombinon de:
    - Vortprovizaj taskoj
    - Gramatikaj aplikoj
    - Esprimkapablo-ekzercoj

La lernolibro supozas antaŭan scion de baza gramatiko kaj aktivan regon de ĉirkaŭ 700 fundamentaj radikoj. Per sistema enkonduko de pliaj 1 682 radikoj, ĝi etendas la vortprovizon al proksimume 2 400 vortoj, ebligante atingi veran mezaltnivelan lingvan kompetenton.

2.2 Komenca Instrua Modelo: „Memlernado-Interŝanĝo-Ekzercado”

Surbaze de legado-instrua filozofio kaj retaj kondiĉoj, la komenca modelo konsistis el tri etapoj:

- Memlernado (antaŭleciona): lernantoj aŭtonome legas tekstojn, trapasante „unuan legadon-relegadon-profundan legadon”, provante kompreni vortojn per kunteksto.

• Interŝanĝo (enleciona): lernantoj laŭvice klarigas tekstpartojn, reciproke kompletigante komprenon, kun instruistaj gvidado kaj korekto.

• Ekzercado (en- aŭ postleciona): lernantoj plenumas akompanajn ekzercojn por plifirmigi scion kaj ricevi reagadon pri lernprogreso.

2.3 Problemoj dum Efektivigo

Kvankam la modelo kongruis kun la lernolibro, praktikaj problemoj aperis:

• Kapablodiferencoj: neegala kvalito de memlernado kaŭzis malsamajn komprenonivelojn, deturnante klasdiskutojn de ĉefpunktoj kaj malaltigante la efikecon.

• Neregata ritmo: la diskutoj estis tro liberaj kaj malfacile gvideblaj, kio malekvilibrigis la tempon.

• Malforta reagomekanismo: Mankis tujaj diagnozoj kaj celitaj korektoj, kio rezultis persistajn miskomprenojn.

3. Optimumigo de la Instrua Modelo

*3.1 Optimumigita Modelo: „Memlernado-**Instruado**-Ekzercado"*

Surbaze de identigitaj problemoj kaj sugestoj de lernantoj, la instrua modelo estis reviziita jene:

• Memlernado (antaŭleciona): daŭrigas la legadprocezon kun emfazo pri la uzo de la vortlisto.

● **Instruado** (dumleciona): la instruisto gvidas klarigojn, fokusante al lingvaj malfacilaĵoj, frazostrukturoj kaj tekstaj stiloj; ŝi/li uzas inspirajn demandojn por stimuli pensadon kaj diskutojn.

• Ekzercado (postleciona): estas asignitaj tavoligitaj ekzercoj, kun instruista reagado adaptita al la individuaj bezonoj de lernantoj.

3.2 Optimumigaj Rimedoj

• Inspiraj demandoj: demandoj kiel „Kio estas la ĉeftemo de tiu ĉi paragrafo?" aŭ „Kiel tiu vorto reflektas la kuntekston?" instigas aktivan pensadon.

• Reagomekanismo: klasaj demandoj kaj ekzerc-rezultoj helpas taksi la lernostaton, ebligante alĝustigojn de instruaj strategioj.

• Tavoligitaj ekzercoj: bazaj kaj altnivelaj taskoj respondas al diversaj lernniveloj, kun aldonaj, individuigitaj defioj proponitaj de la instruisto.

4. Instruaj Rezultoj kaj Reflektado

4.1 Instruaj Rezultoj

• Pliigita klasefikeco: Sub la gvidado de la instruisto, la uzo de tempo estas pli racia, kaj la enhavo prezentata restas kohera kaj konciza.

• Pliprofundigita tekstokompreno: Lernantoj akiras pli profundan komprenon pri la strukturo de la teksto kaj la uzo de la lingvo, danke al celita instruado kaj analiza legado.

• Pozitiva lernrespondo: Lernantoj taksas la lecionojn kiel enhavoriĉajn kaj utilajn materialojn; la inspiraj demandoj stimulas pensadon, dum la memlernado kaj ekzercoj fortigas aŭtonomecon kaj la senton de progreso.

4.2 Mankoj kaj Plibonigaj Direktoj

• Limigita individua subteno: La reta instruado malfaciligas personan gvidadon; iuj lernantoj bezonas plian, adaptitan helpon.

• Plibonigenda interago: Pro tempaj limigoj kaj teknikaj obstakloj, lernant-partopreno restas malforta kaj nesufiĉe vigla.

• Etendeblaj instruiloj: En la estonteco, oni povus integri retajn kunlaborajn platformojn kaj tujajn kvizojn por plifortigi interaktivecon kaj altigi la kvaliton de la instruado.

.

5. Konkludo kaj Perspektivoj

Per pli ol unujara retinstrua praktiko, la modelo „memlernado-instruado-ekzercado" pruvis sian efikecon en mez- kaj altnivela esperanta instruado, precipe en tekstokompreno, kultivado de esperanta pensmaniero kaj instrua organizado. La instrua filozofio de *Paŝoj al Plena Posedo* estis sukcese realigita en reta medio, provizante fareblan ŝablonon por esperanta retinstruado.

Estontaj Direktoj por Esperanta Retinstruado

• Hibrida instruado: Integri retajn kaj eksterretajn rimedojn por diversigi lernmanierojn kaj subteni malsamajn lernstilojn.

• Teknika plibonigo: Enkonduki tujajn kvizojn, voĉajn diskutojn kaj kunlaborajn dokumentojn por riĉigi interagon kaj altigi instruan kvaliton.

• Kontinua alĝustigo: Dinamike optimumigi enhavon kaj instruan ritmon surbaze de lernodatumoj kaj partoprenant-reagoj.

Ĉi tiu esploro prezentas konkretan kazon de Esperanta retinstruado, proponante aplikeblan sperton por la planado kaj efektivigo de lernolibro-bazitaj instruaj metodoj.

Inkluzivo en retaj kursoj de Esperanto – spertoj el Serbio

de Aranka LASLO (Serbio)

Enkonduke: Mi estas emerita instruistino de informadiko, esperantistino jam de pli ol kvardek jaroj. Dum mia laboro en la faka mezlernejo Politeknika Lernejo en Subotica (Serbio), mi gvidis nedevigan fak-rondon de Esperanto dum pluraj jaroj kaj organizis lokajn sesiojn de KER-ekzamenoj dum la Tutmondaj Ekzamentagoj. Nuntempe mi aktivas kiel estro de la Instruista Sekcio de Serbia Esperanto-Ligo (SEL), kungvidas retajn kursojn de Esperanto kaj kunlaboras en pluraj teamoj de SEL – pri projektoj, la retejo kaj la sociaj retoj de nia asocio.



La nocio *inkluzivo,* menciita en la titolo de ĉi tiu artikolo, devenas de la latina *includere,* signifanta „inkludi" aŭ „enhavi (ion) kiel parton". En moderna pedagogia kunteksto ĝi esprimas la ideon de akcepto kaj valoro de diverseco – tiel ke ĉiuj lernantoj, sendepende de siaj fizikaj aŭ mensaj diferencoj, havu egalan aliron al partopreno, lernado kaj evoluo. Tio sonas simpla, tamen en la praktiko la vojo al efektiva inkluzivo restas kompleksa kaj multfaceta.

Ni, vidantoj, ĉiutage renkontas obstaklojn kaj lernas venki ilin. Sed kio okazas, kiam iu havas sensan limigon, kiel la foresto de vido? Se oni mem ne travivas tian situacion, oni apenaŭ povas imagi la defiojn, kiujn ĝi alportas. Antaŭ kelkaj jaroj mi unuafoje konatiĝis kun nevidanto – kaj tiel ankaŭ kun la fakto, ke la serbia landa asocio de Esperanto organizas kursojn ankaŭ por blindaj komencantoj. Poste mi pli profunde eniris la temon, konatiĝante kun la blindula E-movado en Serbio kaj en la mondo.

En 2022, post la unua reta kurso por blindaj komencantoj, aperis la deziro de tiuj lernantoj daŭrigi sian progreson – ĉi-foje kune kun vidantaj kursanoj. La instruantaro de SEL, tiam ankoraŭ sen spertoj kaj sen formala trejnado pri inkluziva metodiko, akceptis la defion kaj serĉis la plej bonajn manierojn por instrui en tiaj miksitaj grupoj. Tio kondukis al demando: ĉu eblas atingi

la samajn lernrezultojn por ĉiuj partoprenantoj en grupo, kie vidantoj kaj nevidantoj lernas kune? Kaj kion ni ĉiuj povas lerni el tiu sperto?

Gravan eblon por pliprofundigi tiun demandon donis al mi la Instruista Trejnado en Poznano (Pollando). Danke al la Erasmus+ projekto de SEL, Nedeljka LOŽAJIĆ kaj mi partoprenis en unujara trejnado gvidata de Katalin KOVÁTS kaj Ilona KOUTNY ĉe la Universitato Adam Mickiewicz. Tie ni ne nur lernis pri metodiko de lingvoinstruado, sed ankaŭ prilaboris proprajn esplorajn temojn. Por sia finlaboraĵo Nedeljka elektis la temon „Instruado de Esperanto al nevidantoj", dum mi elektis komplementan temon: „Reta instruado de Esperanto en miksitaj grupoj de vidantoj kaj nevidantoj". Kiel esplormetodon mi aplikis enketadon inter ĉiuj kursanoj de SEL, kiuj lernis en tiaj grupoj. Krom la analizo de propraj spertoj de kursgvidantoj el Serbio, mi trastudis ankaŭ la disponeblajn naci- kaj E-lingvajn fontojn pri la temo. En tiu ĉi kampo, literaturo kaj spertoj de aliaj instruistoj ankoraŭ malabundas. Miaj bazaj literaturaj fontoj estis la Manlibro pri instruado de Esperanto (redaktita de Katalin Kováts)[1] kaj la gvidlibro de la asocio Digitas24 pri la anglalingva instruado al vidhandikapuloj[2]. La defendado de niaj finlaboraĵoj okazis en septembro 2024 en Poznano, kune kun la prezentoj de la diplomlaboraĵoj de la studentoj de Interlingvistikaj Studoj.

Dum la menciita studjaro aperis anonco pri la konkurso Premio La Torre 2024, kun speciala instigo por universitataj studentoj prezenti siajn esplorojn. Mi decidis plivastigi mian laboron kaj partopreni. Tio signifis enkondukon de novaj datumoj el la plej freŝaj retaj kursoj de SEL, kelkaj jam kun internacia partoprenantaro. La plivastigita laboraĵo, titolita *Inkluzivo en retaj kursoj de Esperanto – Ekzemplo de kursaro en Serbio por miksitaj grupoj de vidantoj kaj nevidantoj*, ricevis Honoran Atestilon, pro kio mi elkore dankas al la familio La Torre kaj al ILEI. Tiu rekono estis ne nur persona ĝojo, sed ankaŭ signalo, ke la temo de inkluziva instruado meritas pli larĝan atenton en nia komunumo.

La ĉefa celo de tiuj esploroj estis metodologie plibonigi la retan instruadon de Esperanto en Serbio – kaj pli vaste, doni praktikajn konsilojn

[1] Kováts, Katalin (red.) 2020: *Manlibro pri instruado de Esperanto*. ILEI, E@I kaj Fondaĵo Edukado.net

[2] Jovčić, Ana et al. 2020/21: LEVEL UP – English language program adapted for persons with visual impairment and blindness – Handbook for teachers, DIGITAS24 – Društvo za digitalnu pristupačnost `Asocio pri cifereca alireblo` (Serbio)

kaj kuraĝigon al instruantoj, kiuj planas gvidi inkluzivajn retkursojn de Esperanto.

La esplorrezultoj montris, ke la avantaĝoj de inkluziva edukado ne limiĝas al la nevidantaj partoprenantoj: ĉiuj lernantoj profitas – per kresko de kunsentemo, pacienco, respekto al diverseco, kaj pli forta sento de komuneco. Tiuj konkludoj kongruas kun la trovitaĵoj de aliaj esploristoj (Popovska Nalevska et al., 2024)[3], kiuj montras, ke inkluziva edukado helpas disvolvi humanecon kaj redukti antaŭjuĝojn. La kursoj de SEL konfirmis tion en praktiko: partoprenantoj, vidantaj aŭ ne, lernis ne nur lingvon, sed ankaŭ novan manieron interkompreniĝi kaj kunlabori.

Kompreneble, la vojo al plena inkluzivo ne estas sen defioj. Mankas sufiĉe da instruistoj kun sperto pri instruado al nevidantoj, kaj ne ĉiam disponeblas la necesaj kaj taŭgaj teknikaj rimedoj. Multaj instruistoj, eĉ tre sindonaj, bezonas plian trejnadon por lerni kiel plej efike instrui per voĉaj materialoj, klaraj priskriboj kaj racie adaptitaj lerniloj.

En mia enketo, 62,5 % de la kursanoj opiniis, ke lernado en miksitaj grupoj ne havas malavantaĝojn. Tio estas kuraĝiga signo, kvankam ĝi verŝajne reflektas ankaŭ la entuziasmon kaj pozitivan etoson de la analizitaj kursoj. La konkludo de serbiaj kursgvidantoj estis, ke por komencantoj plej efikas apartaj grupoj, kie instruistoj kun sperto pri nevidantaj lernantoj povas doni solidan bazon; poste, en pli altaj niveloj, miksitaj grupoj nature kondukas al riĉiga interŝanĝo de spertoj kaj perspektivoj.

Krom tiuj ĉefaj konkludoj pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la inkluziva instruado kaj lernado, la esploroj traktis ankaŭ plurajn aliajn vidpunktojn: la teknikajn kaj organizajn kondiĉojn, la psikologiajn faktorojn, kaj la efikajn metodojn de komunikado kaj kunlaboro inter vidantoj kaj nevidantoj.

Kiam la partoprenantoj – lernantoj kaj kursgvidantoj – estas malfermitaj al la laboro en inkluziva grupo, post tre mallonga tempo komencas esti senteblaj la pozitivaj efikoj de tia kunlaboro kaj disvolviĝi la inkluziva

[3] Popovska Nalevska, Gorica et al. 2024: Inclusive education for students with disabilities in the Republic of North Macedonia – challenges and perspectives, Conference proceedings: Improving the quality of life of children and youth, XV International scientific conference „Improving the quality of life of children and youth", Istanbul, Türkiye, Turska, printita: Tuzla (Bosnio kaj Hercegovino) http://erf.untz.ba/web/wp-content/uploads/2024/06/Zbornik_2024_II-dio_compressed.pdf

kulturo. Tian „komunumon” (kursogrupon), konstruitan sur respekto kaj egala partopreno, la kursanoj vizitadas ankaŭ pro la sento de komuneco kaj aparteno al la grupo, ne nur pro la lingvolernado. La inkluzivo en edukado devas esti reciproka, kunlabora – kiam ambaŭ flankoj (en nia kazo: vidantoj kaj nevidantoj – kaj lernantoj kaj instruantoj) akceptas la situacion kaj adaptiĝas al ĝi, kunlaboras kun altnivelaj malfermiteco, toleremo kaj kunsentemo.

En la mondo ofte dividita de diferencoj, inkluziva instruado per Esperanto montras, ke diverseco ne estas baro, sed rimedo por reciproka lernado, dum kiu disvolviĝas pluraj gravaj universalaj valoroj por ĉiuj partoprenantoj, kiel altruismo, humaneco kaj respekto al diverseco.

Esperanto en EuroCALL 2025, aŭ kial denove gravas metalingvistika konscio

de Alessandra MADELLA (Italio)

De la 27-a ĝis la 30-a de Aŭgusto 2025, mi havis la ŝancon partopreni en la konferenco EuroCALL (Eŭropa Asocio por Komputil-helpata Lingvolernado), kiu okazis ĉe la Katolika Universitato de la Sankta Koro (*Università Cattolica del Sacro Cuore*) de Milano, Italio. Temas pri granda internacia konferenco pri tio kiel lingvo-instruado povas uzi la novajn teknologiojn en efika kaj soci-konscia maniero, kiu ĉi-jare havis kiel titolon „*Advancing CALL: New Research Agendas*” (Antaŭenigi komputil-helpatan lingvolernadon: Novaj esploraj vojmapoj). Danke al la financa subteno de UEA kaj ESF, mi povis tie daŭrigi la gravajn rilatojn kun fakuloj pri aplikata lingvistiko, pri kiuj longe zorgis Duncan Charters, kun la grava helpo de Ilona Koutny kaj de ŝiaj poznanaj studentoj. Mia anglalingva prelego *The „30 Golden Hours*” *Project to Learn and Teach Esperanto* (La projekto ’30 Oraj Horoj” por lerni kaj instrui Esperanton), kiun mi prezentis nome de Zaozhuang-a Universitato kaj ILEI, estis akceptita en la oficiala programo. Ĝia internacia publiko inkluzivis interalie japanajn profesorojn pri anglalingva instruado, kanadan respondeculinon pri lingvo-kursoj ĉe la Universitato de Lausanne kaj italajn doktoriĝontajn studentojn pri lingvo-didaktiko de la Universitato por Fremdlandanoj de Perugia. Ili multe interesiĝis pri la ideo de metalingvistika kompetento akirebla pere de

Esperanto, sur kiu baziĝas la video-kurso de tiu projekto por lernejaj instruistoj kaj mia libro pri la historio de la eksperimentoj celantaj pruvi la propedeŭtikecon de Esperanto, kiu akompanis ĝin (*Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*, Edistudio, 2023).



Dum ĉiuj tagoj mi povis aŭskulti multe da interesaj prelegoj kaj prezentoj de afiŝoj fare de kolegoj, starigante demandojn kaj, se eble, parolante al ili pri Esperanto. Ekzemple, profesorino Ana Gimeno de *Universidad Politécnica de València* prelegis pri kunlaboro kun itala mezlernejo por la projekto CLIL (*Content and Language Integrated Learning*: Integrita lernado de lingvoj kaj fakaj enhavoj), kiu uzis artefaritan intelekton surbaze de la plurlingva platformo clistore.eu. Al mia demando, ĉu inter ties lingvoj troveblas ankaŭ Esperanto, la profesorino donis pozitivan respondon, sed evidentiĝis la malmulto da lerno-rimedoj tien alŝutitaj. Ŝi mem tre afable proponis kontakti la programiston de la platformo, se mi povus sendi al ŝi Esperantan vortaron. Mi tion faris post la konferenco, sendante la italan-Esperantan H-vortaron, senpagan retan version de la fama vortaro de Carlo Minnaja. Mi ĝojas diri, ke mi jam ricevis dank-mesaĝon de la programisto – verkitan parte en Esperanto! –, kiu konfirmis, ke li jam alŝutis la vortaron, kiu estas tre bonkvalita kaj estis tre facile aldonebla. Alia CLIL-rilata

ekzemplo de utila interŝanĝo de informoj okazis kun Ilaria Compagnoni, asistanta profesorino de Universitato Ca' Foscari de Venecio, kiu kun kolego studas CLIL-projektojn en Italio. Ŝi tamen neniam aŭdis, ke Esperanto estis instruata dum unu tuta jaro en CLIL-projekto en itallingva liceo kiel ilo por plibonigi matematikajn kapablojn. Fakte, la instruisto Carlo Nicola Colacino, influata de la Metodo Paderbon de Helmar Frank, elpensis manieron por komprenigi al siaj lernantinoj – elstare talentaj pri lingvoj, sed timigitaj de matematika rezonado – ke ankaŭ matematiko estas lingvo por paroli pri la universo, nur senescepta kiel baze Esperanto. Colacino uzis la videojn de la „30 Oraj Horoj" kaj aliajn materialojn por konsciigi ilin, ke matematiko iel funkcias kiel la internacia lingvo: sufiĉas lerni malmultajn erojn por poste daŭrigi el tie per rezonado, same kiel en Esperanto oni povas ĉiam krei novajn vortojn el malmulte da donitaj elementoj.

Fakte, dum tiu ĉi konferenco, en kiu kompreneble AI ludis la parton de la leono – alivorte, la ĉefan rolon – , oni ne povis ne senti, ke ni esperantistoj sidas sur trezoro, ĉar ni povas eble kontribui gravan solvon al unu el la plej kritaj nuntempaj problemoj. La franca profesoro Nicolas Guichon de la *Laboratoire ICAIRE de la École Normale Supérieure de Lyon* bone formulis ĝin tie dum sia prelego pri la ekster-klasĉambra lingvolernado de enmigrintoj: la uzo de aŭtomataj tradukiloj, tro faciligante tradukadon, povas bremsi la disvolvon de metalingvistikaj kompetentoj en la lernantoj. Lia proponita solvo estas, ke necesas fokusiĝi pli multe pri la disvolvo de „metateknolingvistikaj kompetentoj", stimulante la kapablon konscie uzi malsamajn komunikilojn. Sed en nia diskutado estis klara la intereso, kiun povus denove havi por fakuloj en la nuntempa situacio la studoj de Helmar Frank kaj aliaj pri la akiro de metalingvistika kompetento pere de la lernofaciliga Esperanto.

Aliaj interesaj evoluoj evidentiĝis dum la ĉefprelegoj de la konferenco. Luke Plonksy de la Nordarizona Universitato substrekis la neceson larĝigi la fakon trans la limigita kampo de la instruado de la angla, ankaŭ publikigante pli da studoj verkitaj en aliaj lingvoj. Fakte, eĉ ne tiom statistike signifaj studoj povas alporti gravan kontribuon al nia kompreno de la afero. Tiu nova vido estas certe bonvena por esploristoj pri la lernofaciligo de Esperanto, kiuj nur malofte akiras la grandajn nombrojn de la kursoj de la angla, sed kiuj povas iel ajn alporti signifoplenajn kontribuojn al scienca diskutado. Marina Orsini-Jones de Universitato Coventry aldonis al tiu nova sinteno internacie feminisman vidon, ligante por la unua fojo la temon de „intersectionality"

(intersekcieco) al aplikata lingvistiko. Certe tiuj ĉi evoluoj igas la pripensadon pri la uzo de teknologioj en lingvo-instruado tre interesa kampo de potenciala kunlaboro kun Esperanto dum la venontaj jaroj kaj malfermas novajn vojojn por niaj esploristoj.

Recenzo al la libro de Alessandra Madella

(Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj. Edistudio, 2023.)

de Ekaterina V. BEBENINA, Profesoro de Rusia Akademio pri Edukado, doktoro habilitita pri pedagogiaj sciencoj

Multaj homoj, kiuj unuan fojon konatiĝas kun Esperanto, komencas de la demando: kial oni lernas ĉi tiun lingvon? La libro donas konvinkan respondon, montrante malantaŭ la lingvo la tutan mondon.

Verkita en la formo de kronologio, fiksante en unu loko la plej gravajn eventojn de pli ol centjara instruado de Esperanto por infanoj, permesante al la leganto sekvi kiel, ekde la kreo de Esperanto, instruistoj, psikologoj, filozofoj kaj lingvistoj pripensis ĝian propedeŭtikan efikon.

La libro povas esti uzata ankaŭ kiel lernolibro por preparado por ekzamenoj pri regado de Esperanto ekde la niveloj B1-B2. Ĝi estas verkita per tre klara, sed samtempe preciza lingvo. Eĉ daŭrigantoj de la agado de doktoro Esperanto, ankoraŭ ne tre bone regantaj la lingvon, havos eblon plibonigi sian scipovon, fortigi propran motivadon kaj samtempe pretigi sin por parto de la demandoj pri la historio de Esperanto, studante la detalojn de multaj ideoj, eventoj kaj sciencaj eksperimentoj.

La bibliografio meritas apartan atenton: ĝi superas kvarcent fontojn kaj malfermas al la leganto vojon al novaj detaloj, al la unua-manaj materialoj kaj al la klaraj pozicioj de la aŭtoroj. Ĝi mem povas esti rigardata kiel vera trezoro por ĉiuj interesataj pri la historio de la Esperanto-movado, pri propedeŭtiko kaj pri interlingvistiko.

Mia persona malkovro, konsidere ke mi pli ol 25 jarojn interesiĝas pri Esperanto kaj transferoj en lernado, iĝis la efiko de Esperanto por disleksiaj

lernantoj. En multaj landoj gepatroj, instruistoj, sciencistoj uzas komplikajn helpilojn, havante je sia dispono facilan, konatan solvon kun multaj aliaj pozitivaj kromefikoj.

Aparta eltrovaĵo estas la intervjuoj. Ilia legado helpas pli bone kompreni la karakteron de la protagonistoj kaj malkaŝas novajn detalojn. Se oni uzos la libron kiel lernolibron, ĉiu studento povas elekti intervjuon kaj prezenti ĝian heroon al la klaso en taŭga momento dum la studado de la historio de la pedagogiaj eksperimentoj. Tiu rimedo helpas plivigligi la edukan procezon kaj montri la personojn, starantajn malantaŭ ĉiuj esploroj.

Fine, la libro estas vasta respondo al la demando pri la senco lerni Esperanton. De ĝiaj paĝoj atenta leganto ekscios ne nur multajn faktojn pri la propedeŭtika efiko de la lingvo por eŭropaj kaj aziaj lingvoj, same kiel al matematiko kaj geografio. Oni vidos multajn homojn, unuigitajn de inspiro, scivolemo kaj deziro plibonigi la mondon – eĉ kiam la tutmonda kunteksto ne favoris tion.

Oni povas esperi, ke la libro ricevos tradukojn al aliaj lingvoj, kio nuligus ĝian solan mankon. Ĉar la plejmulto de tiuj, kiuj jam legas en Esperanto, ne bezonas argumentojn por si mem – ili scias, kial la lingvo gravas. Sed ĉi tiu libro donas al ili bonegajn argumentojn por diskutoj. Do ĝi fariĝas ne nur atenta kroniko kaj klara lernolibro, sed ankaŭ universala ilo por ĉiu, kiu volas klarigi – kial Esperanto estas bezonata hodiaŭ.

Modela agado surbaze de la libro de Alessandra Madella

de Josef VOJÁČEK (Ĉeĥio)

Okaze de mia okdekjariĝo mi ricevis de la Brna E-klubo libron de Alessandra Madella: „Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj”, kiun mi kun granda intereso tralegis. Mi sekvis lastatempajn internaciajn projektojn pri lingvoinstruado kun la Paderborna metodo de profesoro Helmar Frank, kiun mi persone konis el mia doktoriĝa studado de la fako Teknologio de instruado. Mi pripensis, ke mi povus laŭ la libro prepari ĉeĥlingvan prelegon por instruistoj. Antaŭ mia pensiiĝo kaj ankoraŭ kelkajn jarojn poste mi partoprenis kun prelegoj pri Esperanto kaj ĝia instruado en kolokvoj pri kondukado de la lernprocezo, organizitaj de Unuiĝo de ĉeĥaj matematikistoj kaj fizikistoj en Brno. Kiam mi serĉis

informojn pri aktuala kolokvo, mi eksciis, ke jam antaŭ kelkaj jaroj ĝi ŝanĝiĝis al Internacia konferenco MITAV – Matematiko, Informa Teknologio kaj Aplikitaj Sciencoj. Mi hezitis, ĉu la prelego estos akceptebla por la Konferenco. Sed kiam mi en invitilo legis, ke „La organizantoj volas fokusigi la atenton precipe je klerigado en fakoj, kiuj estas por la nuntempa socio nemalhaveblaj kaj tre postulataj", estis decidite, eĉ se instruado de Esperanto estas nuntempe malmulte postulata. Mi preparis por la konferenco MITAV 2025, kiu okazis 19.-20. 6., prelegon kun titolo „Komunikado kaj lingvoinstruado". La titolo intence ne enhavis la vorton Esperanto. Surprizis min, kiel bone la prelego estis akceptita. Ankoraŭ pli mi estis surprizita, kiam mi semajnon post la konferenco ricevis informon, ke mia kontribuo el la konferenco MITAV 2025 estis rekomendita por envicigo en postkonferencan prelegokolekton de elektitaj laboraĵoj, kiu estos forsendita al Thomson Reuters por sekva evaluo. Interesatoj sendu la tekston en la angla lingvo ĝis la 30. 9. 2025 kaj estis aldonitaj kelkaj plipreciziĝitaj postuloj. La prelegon mi havas tradukita anglen (plejparte per Google-tradukilo kun sekva retraduko ĉeĥen por kontroli, ĉu la angla traduko estas en ordo) kaj nun kontrolas ĝin amikino de mia edzino, kiu vivis 40 jarojn en Usono. Do, mi povas supozi, ke la traduko estos sufiĉe bona.

El la landoj kaj sekcioj…

Benino

Lernejaj agadoj en Benino fare de la NRO „Infanoj Ĉirkaŭ Afriko"

La 11-an de decembro 2024, relanĉiĝis, kadre de la lernjaro 2024-2025, la Esperanto-instruado, sed ĉi-jare kun la efektiva enkonduko al legopovo en gepatraj lingvoj. La projekto kovras du beninajn ŝtatajn mezlernejojn, nome la porknabinan liceon kaj la mezlernejon Nº 1 en Lokossa, la ĉefurbo de la Departemento Mono sudokcidente en Benino.

La celitaj lokaj lingvoj estas la fonua kaj la mina/gingbe. La fonua devenas de la sudo, sed estas la plej parolata nacia lingvo en la tuta Benino. Ĉar la unua paŝo en lingvo-instruado tuŝas la enkondukon en la alfabeton, la afero tiel komenciĝis. Ĝenerale, la alfabetoj en multaj naciaj lingvoj entenas literojn kaj literkombinojn, konsistantajn el vokaloj kaj konsonantoj. En la fonua ekzemple, la alfabeto konsistas el 40 literoj kaj literkombinoj, el kiuj 5 estas vokaloj kaj 35 konsonantoj. Ili estas: a, an, b, c, d, ɖ, e, ɛ, ɛn, f, g, gw,

gb, h, hw, i, in, j, k, kw, kp, l, m, n, ny, o, ɔ, ɔn, p, r, s, t, u, un, v, w, x, xw, y, z.

Krom la alfabeto, la kursanoj lernis starigi kaj plenumi operaciojn. Samkiel en pluraj vivantaj lingvoj, ankaŭ en la du koncernataj lokaj lingvoj, la signoj +, -, **x**, **:** kaj = respektive esprimas ***kaj, minus, oble, dividite, estas*** aŭ ***faras*** servante, do, por adicii, substrahi, multipliki, dividi kaj egali.



Ne mankas la tagoj de la semajno kaj la monatoj de la jaro, kio ebligas al la kursaninoj esti kapablaj skribi daton en la celita nacia lingvo.

(La instruistaro: La du instruistoj de la naciaj lingvoj tenas la flagon; malantaŭ Latifou staras la E-instruanto.)

Samkiel la fongbea, la mina devenas de la sudo kaj estas malpli parolata ol la fonua. Temas pri komuna loka lingvo por ambaŭ landoj kaj ĝi similas al la evea, kiu ĉefe estas parolata en Ganao kaj Togolando.

Ekde la lernjaro 2023-2024, en kiu komenciĝis la projekto ĝis nun, ĉirkaŭ tricent (300) gelernantoj malkovris Esperanton kaj lernis diversajn salutvortojn, finaĵojn, imperativon, la tagojn de la semajno kaj la monatojn de la jaro, bazajn nombrojn, ordajn nombrojn, pronomojn kaj nomojn de koloroj.

La kursanoj ekzameniĝis dufoje, la 7an de Junio 2024 en Esperanto, kaj la 28-an de majo 2025 kaj en Esperanto kaj en la naciaj lingvoj.

Septembron 2025, kiam rekomenciĝis la lernjaro (2025-2026), okazis oficiala premio-ceremonio celante la plej bonajn sukcesintojn en ambaŭ ekzamenoj kun enmanigo de atestiloj al ĉiuj sukcesintoj. Estis premiero en la kadro de ĉi tiu projekto.

Eventualaj kontribuoj ĉiuspecaj por la daŭrigado de la projekto (mondonacoj, premiaĵoj ktp.) bonvenas.

Ankaŭ Esperantaĵoj tre bonvenas pro tio, ke ili estas utilaj disvastigiloj servantaj por allogi ne-esperantistan publikon. Por pliaj informoj pri la projekto, bonvolu turni vin al:

Latifou GBADAMASSI, latifougbadamassi@yahoo.fr, infanojcxirkauxafriko@gmail.com



(Surfote: grupa fotiĝo ĉe la porknabina liceo de Lokossa)

Ĉinio

Vizito de Ilona Koutny al Zaozhuang-a Universitato

De la 13-a de Oktobro 2025 Ilona Kounty vizitis Zaozhuang-a Universitato dum sia vojaĝo tra Ĉinio. Estis bona okazo viziti malnovajn amikojn kaj studentojn magistriĝintajn sub ŝia gvido en Poznano, kiuj nuntempe instruas ĉe la loka Esperanto-fako, kiel Long Yunxia (Nuba) kaj Li Bochuan (Briko). En la tago de sia alveno Ilona volis viziti pli profunde la Esperanto-Muzeon en la malnova kampuso, kiun ŝi jam vidis en la pasinto, dum la sekvanta tago estis dediĉita al instruado kaj al interparolado kun la universitataj aŭtoritatoj en la nova kampuso. La matena prelego pri tradukado estis en Esperanto por la gestudentoj de la Esperanto-fako, kiuj

donis siajn ekzemplojn de malfacile tradukeblaj konotacioj de la ĉina lingvo kaj starigis demandojn ĉe la fino. Sekvis vizito al la vic-prezidantino de la universitato, Chu Fumin, kiu estas granda subtenanto de Esperanto kaj kiu informiĝis pri tio kiel Ilona kapablis starigi magistrajn studojn pri Esperantologio en la Universitato de Poznano. En la posttagmezo Ilona denove prelegis en la angla al studentoj de tiu lingvo pri la temo „*Intercultural Communication and Esperanto*" (Interkultura Komunikado kaj Esperanto), substrekante kiel la lingva flekseblo de Esperanto igas ĝin pli taŭga interlingvo ol la angla kiel lingvafrankao. Espereble la semoj de ŝia vizito bone kreskos kaj kontribuos al la daŭra favora etoso por la lingvo de Zamenhof ĉe Zaozhuang-a Universitato. Ambaŭ prelegoj estos poste spekteblaj en la Jutuba kanalo „Esperanto + Edukado ILEI".

Alessandra MADELLA

Finnlando

Memoro de Saliko



Raita Pyhälä forpasis la 20-an de Aŭgusto 2025, je la aĝo de 85 jaroj. Saliko, kiel homoj konis ŝin en Esperantujo, estis la traduko de ŝia finna nomo. Profesie ŝi estis instruistino de la franca. Ŝi malkovris Esperanton en siaj 50-aj jaroj kaj estis tuj allogata de ĝia interna ideo. Malgraŭ la rareco de lerniloj en la finna kamparo antaŭ la atingo de interreto, ŝi sukcese lernis la lingvon dank' al samlandaj kaj internaciaj geamikoj kaj mem instruis kursojn diversloke. Por ILEI, ŝi iĝis estrino de la Finna Sekcio kaj inter la motoroj de la konferenco en Övik, sed ŝi ĉiam konsideris sin parto de pli granda movado, kiu vivas danke al la eĉ nevideblaj kontribuoj de ĉiuj. Ni aŭskultu, do, tri voĉojn inter la multaj homoj, kiuj havis la bonŝancon konatiĝi kun ŝi en Esperantujo.

Tiel memoras ŝin la itala instruistino Luigia Oberrauch: Mi konis persone sinjorinon Saliko kaj estis ĉiam granda plezuro renkonti ŝin dum la kongresoj en Italio kaj Finnlando. Ŝi esti bela, tre blonda, kun varma rideto kaj tre bone parolis Esperanton. Al ŝi ligis min ankaŭ komunaj interesoj kaj ofte mi havis la eblon legi ŝiajn kontribuojn en la revueto Juna amiko. Dum la jaroj kelkaj el niaj lernejanoj de Esperanto partoprenadis en ĝia famkonata

Fabelkonkurso, pri kiu Saliko aktivis. Ekzemple, en JA 1/2006 oni parolis pri la unua loko akirita de Italaj infanoj kun familia nomo Bolognesi, ĉar intervjuis ilin Saliko. La infanoj loĝis en Mezzano de Ravenna kaj ilia instruisto estis la karmemora Angelo Barisani. Aliaj belaj kontribuoj de Saliko al JA en tiuj jaroj estis la foto „Skoltinetoj kuiras kaj manĝas ĉe la rando de arbaro" (2/2006), la artikoloj pri ordinara vivo „Fajro-brigada hobio" (3/2005) aŭ „Kion faras glaci-rompaj ŝipoj" (3/2006) kaj intervjuo kun japana mondvojaĝanto, kiu vojaĝis dum tri jaroj dank' al la Pasporta Servo (2/2005).

Alessandra Madella skribas: Saliko multe substrekis la gravecon de Juna Amiko, eĉ donacante monon al ILEI por senpage havigi nian belan kaj utilan revuon al samideanoj el Afriko kaj aliaj nepagipovaj landoj. Ni tiam korespondadis kaj kunlaboris dum kelkaj semajnoj por certigi, ke ni povu utiligi ŝian malavaran donacon en la plej bona maniero, feliĉigante kiel eble plej multe da samideanoj. Tiam mi komprenis kiel sindona, kuraĝiga kaj afabla homo ŝi estas.

Kaj jen la poezia memoro de la franca instruisto Emmanuel DESBRIÈRES:

Saliko. Tiu nomo speciale sonas al mi.

Salikoj estas simplaj arboj. Ili trankvile staras laŭ riveroj kaj lagoj.

Sed estas ili, kiuj fortigas la bordojn kaj permesas al aliaj estaĵoj kreski.

Saliko-Raita estas en nia memoro tia: modesta sed decidiga.

Tiam juna esperantisto kaj instruisto kun Florence ni konatiĝis kun Saliko kaj ŝia edzo Matti. Tio okazis danke al Ginette MARTIN. La finna paro vizitis nin plurfoje en Francio, ĉu en Vogezoj (montetoj nord-orientaj en la lando), ĉu en Juraso kien ni transloĝiĝis kaj konstruis domon el pajlo. Memoron de nia eta restado en Finnlando ĉe Saliko kaj Matti, eĉ marŝante sur la frostiĝinta lago de Lastujärvi dum februaro 2002, mi tre kare gardas en mia koro kiel vivantan bildon de familia homara Mondo, kiun permesas Esperanto. Tiaj momentoj, kaj aliaj en Esperantujo, pli fortigis mian decidon dediĉi mian tempon al la disvastigo de nia universala lingvo.

Dankegon, Saliko. Ne nur pro la transdono de la lingvo sed ĉefe de ĝia interna ideo.

En fabelo, vi nun verŝajne staras ie ĉe lago inter aliaj salikoj. Tutsimple.

Emmanuel DESBRIÈRES, Alessandra MADELLA, Luigia O. MADELLA

Francio

Bone paroli france por iĝi franco

Migrintoj, kiuj deziris iĝi francoj, devis pruvi, ke de pluraj jaroj ili loĝas en Francio, havas laborkontrakton (do ne nigre laboras), havas familion (ofte gefiloj naskiĝis en Francio) kaj loĝejon. Sed tio ne plu sufiĉas. Ministeria cirkulero de la 2-a de majo 2025 devigas la petanton majstri la francan lingvon! Ĝis nun necesis koni la francan lingvon – minimumo por integriĝi, labori, kompreni la medion, kie ili vivas ks; ekde nun necesas koni la historion, la kulturon kaj socion de Francio, aldonante la rajtojn kaj devojn de civitano. Interese, ke la nivelo estas tiom alta, ke ne plu temas pri integriĝo sed male pri multigo de obstakloj por malpermesi francianigon, protestas asocioj de helpo al migrantoj.

Ekde la 1-a de januaro 2026, por ricevi restadpermeson, ne plu sufiĉos nivelo A1, kiu permesas elturniĝi en la ĉiutaga vivo, sed A2 (t. e. nivelo de la franca ekzameno, kiun trapasas 15-jaraj lernantoj en mezgrada lernejo). Por peti 10-jaran restadpermeson, necesos B1. Por ricevi francan naciecon, nivelo B2, t.e. nivelo de universitataj studoj.

La testoj estas organizitaj de la Nacia Edukado, kostas de 130 ĝis 150 eŭrojn kaj konsistas el tri partoj: skriba kaj parola kompreno kaj skriba verkaĵo (ekz-e en 2 horoj kaj duono skribi 250-vortan leteron al urbestro por kontesti la cirkuladon de aŭtobuso en sia strato). Interese franca gazeto „Le nouvel obs" (nova observanto) organizis provsesion kun diplomitaj francoj .... kiuj faris multajn erarojn, streĉiĝis kaj trovis la ekzamenon malfacila. Evidente, migrintoj, kiuj laboras en restoracioj, konstruado ktp ne havas la eblon sekvi kursojn, eĉ paroli france kun francoj, do ne progresas. Sekve, ili timas, ke oni forĵetos ilin el Francio, eĉ se de pluraj jaroj ili senprobleme vivas kaj laboras tie!

La nacia edukado funkciigas en kelkaj ĉefaj urboj kaj en kelkaj lernejoj kurson de la franca por ĵusalvenintaj lernantoj. Dum la lernojaro 2023-2024, mia nevino, kiu instruas al 5-jaruloj en infanlernejo havis en sia klaso 8 infanojn el 12, kiuj ne parolas la francan, kvankam ili naskiĝis en Francio, sed en nefrancparolantaj familioj. Nerektaj viktimoj de la pandemio: pro trudendomigo, ili restis en la familio, aŭdis la francan tra la maskoj (do fuŝe kaj mise), ne vidis la lipmovojn ... kaj ne parolis: grava handikapo por studi iun ajn fakon!

Renée TRIOLLE, triolle.renee@wanadoo.fr

Nederlando

Simon Smits forpasis



Simon P. (Petrus) Smits (20 marto 1934 – 20 julio 2025) estis komunuma sekretario en Zoetermeer, post translokiĝo al 's Heerenhoek en Zelando plu aktivis kiel membro de komputila kaj bilarda kluboj, sed en Esperantujo mem gvidis klubon en Zelando kaj ofte partoprenis en tiu de Heide (Belgio). Li pledis por Esperanto-instruado en Vlissingen kaj regule informis pri la lingvo, ankaŭ en eksterlando. Foje rezultis indaj gazetartikoloj.

En Nederlando li kiel sekretario kun mag. F.Winkel kiel prezidanto servis ne nur en „Nederlanda Katoliko” (malfondita en 2014), sed ankaŭ en la Fondaĵo Esperanto ĉe la Instruado, kiu sponsoris la privatdocentecon ĉe la Universitato de Amsterdamo, kiun sekvis de 1998 la speciala katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto.

Por NGGE (Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto) Simon transprenis multajn taskojn, fine aldonante al sia delonga protokolado funkciojn de redaktoro, sekretario kaj kasisto. Ĉion li plenumadis zorge kaj bone kunlaborante.

Interalie en Kotonuo, Benino li ĉeestis la ILEI-kongreson kaj amuze raportis. En ekskurso la partoprenantoj devis tiri la stagnantan buseton el la koto, helpate de lokuloj. Kaj unu el tiuj eĉ regalis per forta alkoholaĵo...

Li mem sukcesis en la Meza Esperanto-ekzameno. Sian plurlingvan scipovon li povis utiligi en Pollando (ofte vizitante Maria Majerczak en Krakovo, Pollando), sed li parolis ankaŭ france en Kotonuo. La nederlandan li verve defendis kontraŭ nenecesaj anglismoj, fine mem prezidante la Fondaĵon Taalverdediging (lingvodefendo).

Nia NGGE preskaŭ orfe postrestas kaj ni ripetas oftajn alvokojn de Simon: se vi interesiĝas pri Esperanto-instruado, eĉ ne kiel instruisto, ne hezitu fortigi nian socieon.

Rob MOERBEEK

Svislando

Se vere ni volas pacon…

Se vere ni volas pacon, ni unue devas malkonstrui la logikon, kiu kondukis al la nuna socio kaj poste instigi la popolanojn al ekago kaj laboro por konstrui pacon bazitan sur principoj kiel

- **kunlaboro anstataŭ konkurado,**
- **empatio anstataŭ malamo,**
- **kunlaborado anstataŭ konkurenco,**
- **solidareco anstataŭ interna batalado por potenco,**
- **malferma menso anstataŭ rapidaj juĝoj,**
- **helpado anstataŭ milito,**
- **kaj konstruado de paco anstataŭ rearmado.**

Ĉi tiuj valoroj hodiaŭ estas malaperantaj pro la liberecmortigaj kaj militistaj agadoj de niaj gvidantoj, kies nura celo estas la serĉado de potenco. Feliĉe la ekzemplo de Kostariko – senarmea ŝtato – la movadoj aktivaj por paco kaj la vekiĝantaj popolanoj, alportas al ni ion por esti pozitivaj.

Georges TAFELMACHER (trad. Mirejo GROSJEAN)
(Fonto: Svisa sendependa gazeto *L'Essor* aprilo 2025)

Ĉu ŝajnigaj teatrecaj ekzercoj en lernoĉambro estas senefikaj? (*debato el la diskutgrupo e-ins)*

Ramon PERERA I PERERA: Mi proponas debattemon se vi tion taksas oportuna. Dum mia profesia vivo mi laboris kiel inĝeniero. Tamen, ankaŭ instruado de lingvoj [Esperanto kaj aliaj] interesis min. Ni lasu aparte vere dotitajn personojn. Mia sperto estas, ke lingvon oni vere akiras nur se oni vivas en medio kie ĝia uzo estas nepra kaj deviga. Konata ekzemplo pri tio estas la restadoj en Kastelo Grezijono.
Ŝajnigaj teatrecaj ekzercoj en lernoĉambro estas senefikaj.

Mireille GROSJEAN: respondante al Ramon Perera, mi dirus jenon: Jes, evidente, baniĝi en Eo-medio estas la plej bona maniero progresi en la lingvouzo. Tio povas okazi en Eo-centroj kiel Grésillon, en Kultura Centro Esperantista en la okdekaj jaroj, tie en La Chaux-de-Fonds mi lernis la

lingvon. Plie laŭ Zlatko Tišljar en tiaj Eo-centroj estas esperantistoj el diversaj landoj kaj regionoj de la mondo, do la komencanto estas devigata ekuzi la lingvon kaj ne povas eskapi en krokodiladon. La komencanto tuj konstatas kaj sentas tre konkrete la bezonon uzi nian lingvon kaj la miraklon de tia komunikado. Baniĝi en Esperanta medio spronas la motivadon de ĉiuj progresemaj esperantistoj.

Mi ne dirus, ke „Ŝajnigaj teatrecaj ekzercoj en lernoĉambro estas senefikaj.” Evidente ili ne similas al la supre priskribitaj veraj situacioj, sed ili ebligas ekzerci sin pri parolado, senti la encerban laboron de elekto de vortoj, almeto de la ĝustaj finaĵoj, zorgi pri vortvico kaj ĝusta prononco... senti kaj trejni sin pri la eksterordinara encerba laboro, kiu okazas dum parolado, post decido de tio, kion oni volas diri. La vojo inter mia penso kaj mia dirita frazo estas longa, komplika kaj tikla. La parolanto devas vesti siajn pensojn per la lernenda lingvo uzante ĝiajn eblojn, kiuj ne nepre koincidas kun la ebloj de la gepatra lingvo. Pro tio komencantoj fine de plena tago en Esperanto-medio sentas lacecon. Tio estas normala simptomo. La programo "Ekparolu" de edukado.net proponas al komencantoj eblon ekzerci sin pri parolado; tre efikaj momentoj.

La du progresmanieroj, en Eo-centro kaj en lokaj kursoj, ne similas simple pro la malsama daŭro. Kiam mi instruis la germanan al franclingvanoj, mi vidis ilin kvinfoje semajne dum 45 minutoj. La jara sumo atingas 150 horojn. Se vi restadas en Eo-centro, vi diras matene: „Bonan tagon, ĉu vi dormis bone?” ĝis vespere „Dormu bone, havu belajn sonĝojn!” kaj ĉio inter tiuj du momentoj okazas en Eo. La suma daŭro estas proksimume dek du horoj. Unu semajno donas al vi 84 horojn. Do du semajnoj en Eo-centro similas al unu instrujaro. Se vi praktikas Eon unufoje semajne dum duhora vespera renkontiĝo, vi atingas jare 80 horojn. Tamen la medio ludas centran rolon: Eo-centro ebligas al la lernanto kompletan banon en la lingvo, kio malofte okazas en la klasoĉambro.

Alia diferenco estas jena: en lingva bano vi aŭdas kaj parolas sen ia kontrolo. Vi ne ricevos ian korektadon okaze de eraro. Vi ne nepre aŭdos plej ĝustajn lingvaĵojn. En kurso vi estas en ĉeesto de instruisto, kiu povos klarigi gramatikaĵon, kaze ke vi tion bezonas. Divenu la plej bonan lernmanieron: restadi ĉe la instruisto! Ekzistas tiaj lingvorestadoj.

Dennis KEEFE: Ho, mi tre ĝojas ekvidi ĉi-matene la temon INSTRUADO DE LINGVOJ! Tia temo estas bela, verda oazo en kiu ĉiuj, kiuj partoprenis en la lerno-lingva aŭ instruo-lingva flankoj de la afero povas libere kaj trankvile paroli.

Al mi plaĉus legi ies opinion pri lingvo-instruado ĉiumatene. La temo estas ege vasta, nekredeble profunda. Mi ĝojas, ke Ramón ekigis ĝin, kaj ke Mirejo tuj kontribuis.

Pri la komento de Ramón: ni, en la 80-aj jaroj, trairis la tutan kursaron de la plej profesia germana fremdlingvo-lernejo La Instituto Goethe, kaj diplomiĝis tie je la tiama nivelo Oberstufe (C2). Mi ne memoras eĉ unu „teatrecan ekzercon" dum la tuta kursaro, tamen ni ĉiuj lernis paroli la lingvon.

Mi donas tiun ekzemplon parte por konfirmi, ke eblas lerni lingvon tute sen enklasĉambraj rolludoj. Kaj tion saman konfirmus jarmiloj da lingvo-lernantoj, ĉu en la germana, la latina, la greka aŭ ajna alia lingvo.

Tio ne signifas, tamen, ke teatro en klasĉambro ne helpas plibonigi lingvo-lernadon. Mi volis per tia ekzemplo nur diri, ke la manko de rolludoj ne fuŝos lernadon.

Pri la komentoj de Mirejo: ĉiam estas ĝojo legi viajn komentojn, ĉar ili estas bone pripensitaj kaj klare esprimitaj. La temo „horoj da lernado (en lernoĉambro) aŭ de horoj da akirado (en natura etoso)" estas kernaj prikonsideroj.

Kiom da horoj en klasĉambro? Bona komenco. Kiom da horoj da hejmtaskoj? Bona aldono. Ĉu aŭdiĝas ekster la klasĉambro, surstrate, la fremda lingvo? Tia estas la situacio en multege da regionoj tra la mondo (Kebekio: franca, angla; Barcelona: hispana, kataluna; Bengalujo: hinda, angla, kannada ...)

La sumo de la horo-kvantoj estas aldona kriterio por kompari kurso-materialon. Ekzemple, la reta versio de la fama kaj bela kurso Zagreba Metodo esperanto12.net, laŭ miaj kalkuloj, enhavas, entute, 26 minutojn da aŭskultebla materialo. Ĉu tio sufiĉas por komencanto?

La video-kurso „Pasporto al la Tuta Mondo", aliflanke, enhavas ĉirkaŭ 7 aŭ 8 horojn, do, 15-oble pli. Ĉu tio sufiĉas? Tra la jaroj mi aŭskultadis la ĉinan lingvon milojn kaj milojn da horoj – nu, ĉu tiom da horoj sufiĉis por atingi eĉ B2-nivelon? (Bedaŭrinde, miakaze, NE!)

Kvanto da horoj estas baza fundamenta demando por ajna lingvo-materialo. Mirejo prave enkondukas tiun temon. Estas bone, starigi demandon pri kvantoj por ĉiaj lingvo-kursoj. Baza demando.

Kaj, imagu, ĝis nun miaj komentoj pritraktas nur la kvanton da AŬDO-TEMPO, eventuale, PAROLO-tempo. Kaj kio pri LEGO-tempo, kaj SKRIBO-tempo, kaj PENSO-tempo?

Nur pensetoj miaj. Neniu bezonas reagi (tamen vi ĝojigas mian koron se vi aldonas ion. Kritikoj ĉiam bonvenas ...)

Ahmad Reza MAMDUHI: Mi kun ĝojo legis la pensojn de karaj Ramón, Mirejo kaj Dennis pri la manieroj lerni kaj instrui lingvojn. Dankon al ĉiuj tri pro viaj riĉigaj kontribuoj!

Mi plene konsentas kun Ramón, ke la baniĝado en vivanta lingva medio estas la plej rapida kaj plej profunda maniero akiri lingvon. Mi mem ofte vidis la diferencon inter lernantoj, kiuj restis semajnon en esperantista medio, kaj tiuj, kiuj dum monatoj vizitis klasojn unufoje semajne. La intenseco simple ne estas komparebla.

Samtempe, mi tre aprezas la nuancadon de Mirejo: ankaŭ „ŝajnigaj" ekzercoj en klasĉambro ne estas sensencaj, ĉar ili permesas al la lernanto trejni pri la vojo inter penso kaj esprimo, sen troa risko. Tio estas grava paŝo en la momento, kiam oni kuraĝe enpaŝas realajn komunikajn situaciojn.

Kaj mi dankas al Dennis pro la emfazo pri kvanto de horoj: finfine, kiom da tempo oni vere pasigas aŭdante, parolante, legante, skribante en la celata lingvo, tio decidas pri la rezulto. Mi ŝatus aldoni ankaŭ la kvalitan flankon: ofte pli gravas **kiel** oni pasigas tiujn horojn. Ekzemple, 30 minutoj da koncentrita parolado kun tuja reagado povas esti pli valoraj ol horoj da pasiva aŭskultado.

Unu el miaj spertoj ĉi-kampe estas "Esperanto-maratonoj", kiujn ni okazigis ekzemple ekde la 10:00 ĝis la 16:00 laŭ la loka tempo dum feritagoj: leciono, konversacioj, kunmanĝado, spektado de filmo/kantovideoj, aŭskultado al prelego kaj diskuto pri tio, ... ĉion ni provis okazigi ĝiseble en Esperanto - simuli lingvo-baniĝadon!

La ideo de Ramón, uzi *Unesko-Kurierojn* por traduk-seminario kiel „plej supera kurso", ŝajnas al mi tre promesplena. Tie kunfluas la lingva trejnado,

la enhava valoro kaj la internacieco de la materialo. Tio povus vere funkcii kiel modelo por progresintaj kursanoj.

Resume: la vojoj malsamas, sed ĉiuj kontribuas – la bano en la lingvo, la klasĉambraj ekzercoj, la hejmtaskoj, la tradukado, la aŭskultado kaj legado. Ju pli riĉa la miksaĵo, des pli sekura la progreso.

Ramon Perera i Perera: Kial mi alte taksas la restad-kursojn en Esperantujo? Mi pensas, ke la avantaĝo kuŝas en la "kvalito" de la situacio. Ne nur en la daŭro de la lerno-tempo. Mi ne scias, kiel bone klarigi tion. Mi provas.

Imagu, ke oni kune manĝas ĉe tabloj kun ses kursanoj. Matenmanĝas, tagmanĝas, vespermanĝas.

Matene mi bezonas X-on [buteron]. Kio, diable, estas la vorto, la esprimo? Mi traserĉas mian vortstokon, mian esprimstokon. Ĉar vere mi BEZONAS ĝin. Poste, mi uzos la saman solvon, adaptitan, por aliaj necesaĵoj. Ankaŭ en la samtagaj tagmanĝo, vespermanĝo. Dum la sama tago mi aŭdos [kaj atente aŭskultos] aliajn kursanojn trapasi similan komunikad-proceson. Ankaŭ, eble, mi havigos al samtablano la disde mi petitan panon ktp.

Esence: vera bezono, ne enua ripetado.

Pro ĝentileco aŭ pro interesiĝo, mi demandos pri la nomo kaj pri la devenlando de alia kursano, kiun vere mi NE KONAS, ktp. Kaj tio povas okazi diversfoje dum la sama restado.

Mi aŭskultas la ĉe-tablan konversacion. Aŭ tiujn dum la kafo-paŭzoj. Mi aŭdas [kaj komprenas!] frazojn, kies strukturo estas tute nova por mi, kvankam mi ja konis la en ĝi uzitajn vortojn [vortradikojn].

Dennis Keefe: Mi tre, tre ŝatas la komentojn ĉi tie! Ili estas longaj, detalaj, kio bele superas nian nuntempan mondon de emoĝioj (vizaĝo kun rideto, vizaĝo kun larmoj, kaj ĉiaj imageblaj simboloj de moskitoj ĝis moŝtoj militaj – nur du el centoj da ikonoj).

La vidpunktoj de instruistoj estos senfinaj; la konvinkoj de lernantoj senlimaj; la konkretaj lerno-situacioj tiom diversaj, ke ni neniam finlistigos

ilin. Alivorte, senlimeco kvadrate, kio povas lacigi eĉ kvantumajn komputilojn. Tamen nin, ne: ni havos vortojn por trinki, manĝi kaj interparoli dum jardekoj. Tiaj interparoladoj iĝas tre bona fono por ĉiaj lingvo-instruistoj. Teorio, praktiko, sed ankaŭ babilado pri ĉio helpas al ni kiuj serioze okupiĝas pri edukado, profesiaj kaj amatoraj, pli bone kompreni ĝuste kie ni troviĝas en la universo de fremdlingva instruado.

Estas bone, ke kursgvidantoj havu preferatajn alirojn aŭ metodojn por instrui, sed samtempe bonas, ke ni memoru, ke estas multege da iloj en la skatolo de lingvo-instruistoj. Indas pripensi ĉiajn situaciojn, ĉiajn gelernantojn. Kaj ni diru ĉiun individuon, ĉiujn, ĉar povas okazi, ke unu, nur unu lernanto devigos min repripensi la strukturon de niaj lecionoj (unu blindulo en lingva kurso por viduloj; unu vidulo en kurso por blinduloj).

Konklude, estis speciala ĝojo al mi persone legi, finfine, komentojn pri lingvo-lernado, kaj pri lingvo-instruado en la paĝoj de ĉi tiu diskutejo.

Dulingva edukado en infanĝardenoj. Kion tio signifus por Esperanto.

de Luiza CAROL (Israelo)

Inter 1970 kaj 1980, mi instruis la anglan en Bukareŝto je ĉiuj niveloj kaj por ĉiuj aĝoj: en infanĝardeno (por infanoj ekde la 4-jara aĝo), en elementa lernejo (por infanoj 6-10-jaraĝaj), en mezlernejo (por lernantoj 10-14-jaraĝaj), en gimnazio (por lernantoj 14-18-jaraĝaj), en la Universitato de Bukareŝto kaj en la Populara Universitato (por plenkreskuloj ajna-aĝaj). Mi havis la okazon kompari la efikecon de lingva instruado por lernantoj je diversaj aĝoj. Tiel mi spertis bone konatan sed tre ofte forgesatan fenomenon: ju pli frue oni komencas lerni lingvon, des pli facile kaj rapide oni kapablas paroli ĝin. Ne mirinde, ke mia instruado en la infanĝardeno estis multege pli efika ol tiu en aliaj medioj. Mirindas, ke oni ne sufiĉe profitas ĉie kaj ĉiam pri la mirakla kapablo de etaj infanoj akiri lingvojn.

Inter 1970 kaj 1980, la instruado de fremdaj lingvoj al lernantoj antaŭ la aĝo de 10 jaroj estis konsiderata ankoraŭ „eksperimenta” en Rumanio kaj komenciĝis ĝuste kiam mi iĝis nov-bakita instruistino. Multaj pridubis la efikecon de tiu „eksperimento”. Iuj gepatroj timis, ke la infanoj estos superŝarĝitaj per tro malfacilaj taskoj. Iuj instruistoj malŝatis la fakton, ke ili

devis labori sen manlibroj, sen uzi skribadon kaj legadon, sen havi almenaŭ la eblecon uzi la spertojn de pli maljunaj kolegoj. Ni, la junaj komencantaj instruistoj, devis prepari ĉiun lecionon laŭ niaj propraj ideoj kaj devis adapti niajn metodojn laŭ la reagoj de la infanoj. Tio estis granda defio, kiun multaj instruistoj preferis eviti. Krome, iuj instruistoj konsideris tian taskon maltaŭga por sia nivelo de klereco kaj sentis sin humiligitaj pro la devigo plenumi ĝin. Tio tute ne estis mia kazo. Mi estis ravita pro la okazo ludi kune kun la infanoj! Mi entuziasme elpensis ludojn, uzante la belegajn pupojn, plušbestojn kaj aliajn ludilojn el la ŝrankoj de la infanĝardeno.

Por elĉerpi plurajn ideojn, mi petis permeson ĉeesti kelkfoje la kutimajn ludojn, kiujn organizis la spertaj instruistinoj de la infanĝardeno en la rumana (kiu estis la denaska lingvo de tiuj infanoj kaj estas ankaŭ mia denaska lingvo). Ĝis nun mi opinias, ke mia tiutempa laboro en infanĝardeno estis pli taŭga por mi ol ĉiu alia laboro, kiun mi faris en mia tuta vivo. Mi nur bedaŭras… ke mi ne faris ĝin por Esperanto… Sed Esperanto eniris mian vivon multe pli malfrue, do tio ne eblis. Antaŭ kelkaj jaroj, mi provis starigi senpagan someran infanvartadon dum unu monato, pere de Esperanto. Sed neniu najbara familio interesiĝis pri tio, kaj la ideo fiaskis. Tamen, se mi ne kapablis konkretigi tiun ideon, tio ne nepre signifas, ke ĝi estis malbona. Eble alia esperantisto sukcesos realigi ĝin… Mi ja konas esperantistajn familiojn, kiuj edukis aŭ ĝuste nun edukas siajn infanojn dulingve, uzante la eduk-avantaĝojn de Esperanto. Mi kredas, ke estus bonege, se oni povus instrui Esperanton ankaŭ en infanĝardenoj.

Miaj spertoj pri instruado en infanĝardeno permesis al mi ekkoni la amplekson de tiu laboro kaj la grandan respondecon, kiun ĝi postulas. La infanoj inter 3- kaj 10-jaraĝaj travivas la periodon, kiu estas verŝajne la plej grava por la formado de homa karaktero. Se dum tiu periodo oni permesas al ili mensogi, ŝteli, kalumnii, ofendi, frapi siajn kolegojn, konduti malafable kaj malĝentile ktp, estos jam malfacile ŝanĝi tiajn kutimojn, kiam ili fariĝos adoleskantoj, kaj preskaŭ neeble plibonigi iliajn personecojn, kiam ili fariĝos junaj plenkreskuloj. Se dum la infanaĝo la instruisto punas ilin laŭ maniero, kiu humiligas ilin, kondutas kun ili sen sufiĉe da amo kaj komprenemo, sen sufiĉe da pacienco … la animaj vundoj de la infaneco restas dum la tuta vivo. Ne estas facile trovi la taŭgan vojon eduki etajn infanojn. Se ni deziras pli harmonian socion, se ni deziras pacon kaj justecon en la mondo, ni devas rememori, ke la onta generacio de juĝistoj, ĵurnalistoj, politikistoj ktp ne kreskas tiom simple kiel arbaraj fungoj post pluvo. La bazaj ecoj de la

karakteroj formiĝas en la infaneco, kiam la influo de la vartistinoj kaj infanĝardenistinoj estas pli granda ol oni kutime supozas.

Se ni volas realigi pli bonan mondon por la onta generacio, ni devas doni al la instruistoj de infanĝardenoj kaj de la unuaj klasoj de bazlernejo la respekton, kiun ili meritas. Niatempe, en multaj landoj ĉiuj instruistoj ricevas hontinde malgrandajn salajrojn (hontinde por la koncernaj registaroj, ne por la instruistoj…), kaj la infanĝardenistinoj gajnas eĉ malpli ol la lernejaj instruistoj. Kutime, instruistinoj por etaj infanoj laboras ĉiusemajne multe pli da horoj ol iliaj kolegoj laborantaj en mezlernejoj kaj gimnazioj. Kaj krome, ili alfrontas fortajn antaŭjuĝojn pri sia laboro, en la senco, ke multaj personoj konsideras bagatela ilian kontribuon al la edukado de la onta generacio. Mi demandas min, ĉu tiu malestimo por infan-vartado kaj infan-edukado fontas el ĝenerala malestimo por virinoj aŭ inverse. Verŝajne tiuj du aspektoj de socia maljusteco estas iel ligitaj.

Antaŭ kelkaj monatoj, kiam Fernando MAJA proponis diskutojn pri virina agado en la Esperanta komunumo, mia unua penso estis, ke niatempe tiaj diskutoj jam senutilas en la plejmulto de la landoj, kie ni jam havas virinojn, kiuj laboras en scienco, tekniko, medicino, politiko ktp. Sed tuj poste, mi rememoris pri la bedaŭrinde tutmonde disvastigita socia maljusteco koncerne instruadon de etaj infanoj. Kaj mi rememoris, ke mi **neniam** renkontis dum mia tuta vivo viron, kiu laboras kiel instruisto de infanĝardeno. Kaj tiam mi opiniis, ke eble indas starigi tiun ĉi diskuton kadre de la virina agado. Mi prokrastis verki pri tio, sed nun aperis la okazo tion fari. Tamen nenia socia problemo povas esti nur virina aŭ nur vira. Kaj edukado de etaj infanoj ja estas grava socia problemo, do ĝi ne apartenas nur al virinoj. Do mi esperas, ke ankaŭ viroj partoprenos en la diskuto. Fakte mi esperas, ke **precipe viroj** partoprenos en tiu ĉi diskuto, ĉar temas pri provo neniigi longtempan antaŭjuĝon disvastigitan tutmonde.

Mi ofte aŭdas la rezonadon, ke ju pli junaj estas la lernantoj, des pli malmultajn jarojn da lernado iliaj instruistoj bezonas, do des pli malgranda estu ties salajro. Mi proponas diskuti, ĉu tio ne estas antaŭjuĝo. Kial ni ne estu pli postulemaj por niaj infanoj kaj por la estonteco de niaj landoj? Kial instruistoj de infanĝardeno ne havu sufiĉe da tempo kaj mono por pliprofundigi siajn konojn pri psikologio, filozofio, sociologio, saniga dietiko, sanigaj fizikaj ekzercoj ktp? Kial ili ne havu tempon kaj monon por evoluigi siajn talentojn pri muziko, danco, literaturo, pentrado, skulptado, saniga kuirado ktp? Kial ili ne eklernu Esperanton por plilarĝigi tiel sian

propran kulturan horizonton kaj tiun de siaj etaj lernantoj? Kial niaj etaj infanoj ne kresku kun **ge**instruistoj de infanĝardeno, kiuj kunlaboru normale kaj egalrajte, samkiel **ge**instruistoj kunlaboras nun en mezlernejoj, gimnazioj kaj universitatoj?

Mi verkis tiun ĉi artikoleton por starigi kelkajn temojn por diskutoj. Mi esperas ricevi reagojn de **ge**samideanoj.

Dulingva edukado al etaj infanoj, Luiza Carol, komentoj de Mireille Grosjean

Post legado de la artikolo de Luiza mi devas aldoni, ke estas en Svislando viraj infanĝardenistoj, ne multaj, sed ne nulo.

Post multaj jaroj da instruado en mezlernejo (infanoj 11-ĝis-15-jaraj) mi konstatas, ke diversaj kolegoj sen elstaraj kapabloj en pedagogio iras al gimnazio (liceo). Tie la plej malbonaj el ili en pedagogio iras finfine instrui sian fakon en universitato. Tie la studentoj estas bonaj kaj kapablas elturniĝi de si mem, ili ne plu bezonas konkretajn ekzercojn nek precizajn klarigojn de iu instruisto. Do se ni kalkulas inverse, la plej talentaj instruistoj devas esti tiuj, kiuj instruas al la plej junaj infanoj. Tiu dedukto estas iom skemema, sed fakte aŭ hazarde ĝi konfirmas la dirojn de Luiza.

Vilaĝa laboro

de Rimedo Song (SONG Zhenyuan)

Jam du jaroj pasis de kiam mi diplomiĝis en la Esperanta fako de la Zaozhuang-a Universitato, en Shandong-provinco de Ĉinio. Nuntempe mi estas juna publika administranto en ĉina vilaĝo kaj kreskis en mi la deziro denove verki en Esperanto, pro diversaj kialoj.

Unue, kvankam efektiva vilaĝa laboro igis min pli realisma, mi volas konservi ioman romantikismon de mia junaĝo. Mi estas esperantisto – tio neniam ŝanĝiĝos.

Due, kontrolante la retpoŝton de mia oficejo, mi ricevis mesaĝon de „edukado.net”. Kun espero mi malfermis ĝin, kaj efektive ili deziris al mi feliĉan naskiĝtagon. Kvankam temis nur pri programo, tio donis iom da humanisma varmo al mia vivo.



Trie, mi volas montri al aliaj la pensmanieron de novgeneraciaj ĉinaj junuloj, kiuj laboras en vilaĝoj por idealo. Forlasi laborŝancon ĉe EPĈ kaj elekti reveni al kampara laboro estis por mi radikala decido, kiu tamen havas pli profundajn radikojn en miaj universitataj studoj de Esperanto, kiuj plenigis min je „internacia perspektivo" kaj „ambiciaj celoj". En mia koro ĉiam ekzistis revo: junuloj devas fari ion signifan!

En 2021, mi iris al Xinjiang kiel volontula instruisto. De Linyi ĝis Kaŝgar, mi trairis pli ol 4700 kilometrojn, kvar tagojn kaj tri noktojn. Min bonvenigis flavaj sabloŝtormoj. Tamen la infanoj estis mirindaj. Unuafoje renkontante min, ili kun grandiĝintaj okuloj demandis: „Ĉu vi estas la nova instruisto?" Kiam mi kapjesis, la klasĉambro eksplodis en ĝojo kaj la infanoj kriis: „La instruisto el Shandong alvenis!". Post tiu leciono, instruisto Tohtigul klarigis: „Adax Rahmat (amiko dankon). Shandong bala (junulo de Shandong), estas tro malmultaj instruistoj. Unu persono instruas ses aŭ sep klasojn. Nun vi venas helpi nin, dankon!"

Kiam mi aŭdis tion, mia koro peziĝis. ĉar mi ne sciis, ĉu mia revo tie troviĝas, sed mi klare vidis la revojn de la infanoj: dum leciono de la ĉina, la knabino Munisa ĉiam erare skribis, do mi tenis ŝian maneton kaj kunskribis; en deklamklubo, Abudusalam erare prononcis, do mi ripetadis kun li; en Esperanto-leciono, Ayigul montris Shandong sur la mapo kaj infanvoĉe diris „Mi volas iri tien". Kiam mi foriris, ili donis al mi desegnaĵon kun surskribo:

„Instruisto Song, mi revas fariĝi instruisto kaj studi en universitato en Shandong!” En tiu momento, mi komprenis: se oni volontulas por sia lando, la revo de unu persono povas ekbruligi la esperon de alia.

Diplomiĝinte en 2023, mi alfrontis labor-elekton. Unuflanke la oferto en Pekino de EPĈ rekte rilatis al Esperanto. Aliflanke estis la eblo iĝi juna publika administranto, por kiu mi devis reveni al vilaĝo de mia denaska urbo Linyi kaj zorgi pri kampara laboro. Tio ŝajne tute ne rilatis al Esperanto, sed eble mi povus per ĝi vivigi kelkajn el ĝiaj idealoj. *La Kanto de Montoj Yi kaj Meng*, kiun ni Linyi-anoj aŭdis de infanaĝo, influis mian decidon! Vi povas konsideri mian elekton stulta, sed mi daŭre revas, ke junuloj devas fari ion signifan!

Tiel, en julio 2023, mi alvenis al la vilaĝo Beizhang de la vilaĝego Yangji de Tancheng-gubernio. Tuj post mia alveno, mi devis prizorgi la river-patrolon por malhelpi dronadon de infanoj. Mi kaj la vilaĝa sekretario senĉese admonis kamparanojn. Sed iam maljunulino demandis min: „Junulo, vi nur diras, ke ni prizorgu infanojn, sed kiu faros la kampolaboron? Ĉu vi povas prizorgi niajn infanojn?” Aŭdinte tion, mi ruĝiĝis - mi pensis, ke mi jam profunde komprenis la popolanojn, sed fakte tute ne.

Tial, mi aranĝis klasĉambron en nia vilaĝo, prizorgante infanojn tage, preparante kursojn nokte kaj starigante „Lernejon de Yi Meng”. Dum la lecionoj, Zhang Xiaoxiao ĉiam donis al mi sukeron: „Sinjoro, manĝu ĝin! Ĝi estas dolĉega.” Vidante lian naivan rideton, mi komprenis kiom gravas efektive fari aferojn laŭ la deziroj de la popolanoj. Infanoj estis tiel prizorgataj, sed la monujo de la vilaĝanoj estis malplena. Iam manĝante jianbing-on (ĉinan paneton), mi subite konsciis: la vilaĝo havas bonajn metiistojn, sed mankas merkata pensmaniero; ili havas laborforton, sed mankas industria ĉeno. Jen malfacilaĵo, kiun junuloj devas superi!

Ek! Malgraŭ la malfacilaĵoj, la loka kvalito „decidi kaj tuj fari” ekestis! Sen mono, sen ekipaĵo? Mi kaj la vilaĝa sekretario multfoje vizitadis firmaojn por peti investon kaj akiris 50 000 juanojn. Sen loko? Mi kaj la vilaĝanoj kune transformis neuzitajn loĝdomojn. Sen produktaj sakoj? Mi, kiu studis Esperanton, desegnis per mano sakon kun nia historia saĝulo Zhuge Liang kiel „nova kamparano”, kiu tenis bambuan glavon unuflanke kaj pan-kradon aliflanke. Neniuj vendoj? Ni portis jianbing-ojn al foiroj, laŭdis ilin al ĉiuj la tutan tagon, ĝis nia gorĝo raŭkiĝis kaj ni ne plu povis paroli. Tiel finfine venis la unua mendo: „Unue 50 kilogramojn!” Tiun

nokton, telefonante hejmen el la vilaĝo, mia gorĝo doloris kaj ploris, sed mia koro varmis kaj mia sonĝo estis eksterordinare dolĉa.

La persisto en niaj koroj pelas nian industrion de jianbing-oj. En 2024, danke al plurflankaj klopodoj, ni sukcese akiris financadon de 1,5 milionoj da juanoj por realigi normigitan produktejon de 1 500 kvadrataj metroj. La vilaĝa kompanio nun dungas profesian manaĝeron por prizorgi la operaciojn kaj ni etendos tiun industrion al 9 najbaraj vilaĝoj. Antaŭvideblas, ke la jaraj vendoj atingos 8 milionojn da juanoj kaj pli ol 100 homoj povos partopreni en la produktado, riĉigante siajn vilaĝojn.

Tiel, du jaroj pasis, niaj jianbing-oj vendiĝis al Pekino kaj Ŝanhajo. Jam pli ol 20 vilaĝanoj povas gajni inter 2 000 kaj 3 000 juanojn monate sen devi forlasi siajn hejmojn. Por la vilaĝanoj mi ne plu estas nur „juna publika administranto”, sed „Song de nia vilaĝo”. Ili tiom feliĉas, ke ili povas prizorgi la infanojn kaj enspezis monon, ke ili konsideras min kvazaŭ sian propran infanon kaj mi ricevis rangaltigon. Vere, se oni traktas popolanojn kiel siajn proprajn parencojn kaj zorgas pri iliaj aferoj, ili faras la samon por ni.

Kial junuloj de la Z-generacio en Ĉinio volas iri al kamparo? La valorsistemo de nia generacio estas tio, ke ni ne nur rigardu la stelojn, sed ankaŭ tenu niajn piedojn sur la tero, laborante diligente kaj reale. La loko por realigi nian vivon ne estas en malproksimo, sed en nia kapablo kune ridi kaj vivi kun la vilaĝanoj por transformi la „bonan vivon” el revo al realo per niaj propraj manoj. Mi sentas, ke ankaŭ kiel esperantisto mi elektis la ĝustan vojon kaj pretas daŭrigi ĝin kun la samvilaĝanoj. Mia universitata studado de Esperanto portis min al pli profunda socia konscio, kreskigis mian kapablon larĝe revi kaj fortigis mian obstinon praktike trovi la rimedojn por realigi kun la aliaj niajn idealojn pro la komuna bono.

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Nvard Manveljan.
Lerneja: Julián Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Oberrauch, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Aimé-Patrick Manirakiza**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Arko (Gong Xiaofeng).**

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, *nedeljkalozajic@gmail.com*.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj

socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatuo en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.
La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:
a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.
b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto: dr. MURÁNYI Péter, *HU-9730 Kőszeg, Rákóczi u. 111.* **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, tel*: (+36-70) 931-0530.* Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
La adreso de nia arkivo: https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.
Ni fermis la nunan numeron la 31-an de oktobro 2025,
redaktofino por la sekva numero la 15-an de januaro 2026.


今日社团结缘处
山东省青年世界语协会
Shandong-a Esperanta Junulara Organizo


选 崇 博
专科升本科 还是海纳
杯子